

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

N-ro 619 (6)

Junio 1957



**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

Arto kaj folkloro en la Kongres-Regiono



ARLES
celo de la ĉefekskurso de la 42a U.K.



ESPERANTO

Junio 1957

Revuo Internacia

N-ro 619 (6)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Cion por la redakcio oni sendu al la

Redaktoro: Mag. W. AULD

Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrewshire, Skotlando.

* * *

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Girkonto: 378964.

* * *

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1957): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 10 n.gld.).

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
		1/16 paĝo	8.— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

P. M. Mabesoone, vic-prezidanto, estrarano pri financoj, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O, Nederlando.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

ENHAVO

La Kongreso estas preta	93	Tra la mondo	100
Idoloj kaj generacioj	93	La Juna Vivo	102
De Portugalujo ĝis Finnlando	94	Niaj konkursoj	103
Sinjoro Birg. <i>Schöningh</i>	97	Novaj libroj	104
Poŝtkartoj de turisto	98	Nia forumo	105
Mia ferio. <i>Hattyar</i>	99	42a U.K.	105
Feliĉo kaj amo. <i>Ferlin</i>	103	Nekrologo	106
<i>Rubrikoj</i>		Oficiala informilo	106
Esperantista vivo	95	Internaciaj konkursoj	107
Monda galerio	96	Radio	108

LA KONGRESO ESTAS PRETA

Neniam kiel ĉijare estis pli vera la difino, ke Universala Kongreso de Esperanto estas „kongreso de kongresoj”.

La 42-a ne komenciĝos en Marseille, sed preskaŭ unu monaton pli frue en la Kastelo de Grésillon, kie la esperantistoj debatos kun Albault, Auld, Lapenna, Waringhien kaj Watier la temon: „La evoluo de l'civilizoj kaj la moderna socio”. Ĝi daŭrigos en la urbo kie pulsadas la koro de Eŭropo, Parizo, kun kultura kaj distra programo, kiu kvazaŭ postsekvvas reĝinan viziton: Versailles, monumenta Parizo, ŝipe sur la Sejno...

Al tiom ampleksaj antaŭaranĝoj korespondas proporcie ampleksaj kongresaj programoj. La Universala Kongreso havas sian tradician skemon, sed estus eraro kredi, ke ĉiuj kongresoj estas similaj. Ili same varias, same diversmaniere sed ĉiam originale kaj personece aspektas, kiel senfina estas la famo de la temoj, de la talentaj oratoroj, de la profundaj intervenoj, de la konkretaj rezultoj.

La parto de la Kongreso, kiu plej intime ligas nin al la publika opinio, pere de la raportoj en la gazetaro, radio, kino, kaj televido, estas la faka laboro per Esperanto. Plej unue la Internacia Somera Universitato kaj la Belartaj Konkursoj: la du vivantaj pruvoj de la eblecoj de la Internacia Lingvo sur la kampoj de Scienco kaj Literatura. Sekvas la Infan-Kongreseto, realigo unika en la mondo en sia simpleco kaj en sia ekzemplo de internacia kompreniĝo. En Marseille la kunvenoj de la specialigitaj Asocioj ne nur estos pli multenombraj ol en la pasintaj jaroj, sed iliaj diskuttemoj ankoraŭ pliboniĝis. Sufiĉas citi, ke I.L.E.I. pritraktos la „Limojn de la profesiaj devoj de la instruisto”, I.S.A.E. diskutos pri „Centro por kultura interŝanĝo”, I.F.E.F. debatos „Esperanton kiel helpilon en la kulturaj rilatoj de la fervojistoj”.

La Kongreso ankaŭ amuziĝos: sur la scenejo de la Operdomo teatra trupo el Barcelona prezentos „George Dandin” de Molière en Esperanto. La programo prezentas ŝanĝon kompare kun la unua plano, sed la kongresanoj certe ĝojos pro tio. La verko de unu el la plej grandaj aŭtoroj de la tutmonda Teatro, en la traduko de d-ro Zamenhof mem, plej digne celebros la 70-jaran datrevenon de la Internacia Lingvo.

En la lastaj jaroj estis kaj estas farataj grandaj klopodoj por levi la nivelon de la universalaj kongresoj. Tiu strebado por doni kiel eble plej valoran enhavon al la kongresa programo kaj por altiri la atenton de pli larĝaj intelektaj tavoloj certe daŭros en la venontaj jaroj. La Honor-Komitato, kies plej alta reprezentanto estas la Prezidanto de la Franca Respubliko, estas unu el la plej prestiĝodonaj, kiujn niaj kongresoj entute havis: la nomoj de la Ministroj, de la membroj de la Franca Akademio, de la Universitataj Rektoroj plej ofte havas internacian aŭtoritaton. La Loka Kongresa Komitato ĉijare invitis ne nur la registarojn de 80 landoj, sed por la unua fojo 125 internaciajn neregistarajn asociojn en konsultaj rilatoj kun UNESKO kaj multajn aliajn organizaĵojn.

Kiel oni povas konstati, en la momento en kiu mi skribas ĉi tiujn liniojn, fine de aprilo, la tuta Kongreso estas preta en siaj ĝeneralaj konturoj. Restas la grava tasko de la esperantistoj ne nur multnombre aliĝi kaj ĉeesti la Kongreson fizike, sed ankaŭ plej aktive partopreni morale kaj intelekte en ĝiaj laboroj.

Ĉiu progreso estas ebla nur se la ĝeneralaj cirkonstancoj estas maturaj. Se la Universala Kongreso atingis pli altan ŝtupon, tio signifas, ke samtempe ankaŭ ĝia publiko, la kongresanaro, kiu ja ĝis certa grado respogulas la tutan Movadon, troviĝas sur tiu ŝtupo. Tial oni povas prave atendi, ke kun la aktiva helpo de ĉiuj kongresanoj, la U.K. en Marseille signifos pluan paŝon antaŭen en la ĝenerala progresado de la Esperanto-Movado.

Gian Carlo Fighiera

Idoloj kaj Generacioj

Ja de la plej antikva tempo popolamaso bezonis idolon; kaj laŭ la intelekta grado en ĉiu tempo estiĝis idoloj plej diversaj: naturaj elementoj (ŝajro, akvo), ĉielaj korpoj (suno, luno, planedoj), rigardataj kiel dioj, personigitaj per statuoj al kiuj oni prezentis oferojn; ankaŭ triumfaj generaloj, famaj ŝtatestroj, kleraj filozofoj, kiujn oni honoris per vera kulto.

En niaj modernaj tempoj idoloj fariĝas teatraj artistoj, filmaj aŭ sportaj famuloj, al kiuj la popolo identiĝas interne; tute aparte la gejunuloj ekraviĝas antaŭ ili.

Tamen, se kuŝas en tiu fenomeno unu intelekta ekzaltiĝo, multaj aliaj personoj ĝin serĉas en literaturo, historio aŭ (tra geografio) en vojaĝoj. Tial multe da personoj interesiĝas pri lingvoj por penetri alilandajn kutimojn. Sed granda peno tio estas, kaj malmultaj sukcesas... ĉar jam oni bone scias apenaŭ la duonon de sialingva vortaro!

Nu, tian intelektan ekzaltiĝon la esperantistoj trovas per kaj en la Internacia Lingvo mem; per ĝi, kiu pro mirinda simpleco atingebla por ĉiuj, rompas la malvastan rondon de la naturinklinaj simpatioj kaj kontraŭstaras al interpopola aŭ intergrupala (!) malamo; en ĝi, kiu, dank' al ekvilibra analogio de siaj elementoj, ebligas liberan kaj eĉ jonglan pensadon.

Jes, entuziasme novaj esperantistoj atendas ĝojojn el la riĉa literaturo de la Lingvo Internacia: ili neniel forgesas, ke ĉi tiujn faris, kiaj ili estas, la pioniroj kaj veteranoj; sed, sincere, ili nur bedaŭras, ke la travivita sperto de la malnovaj grupanoj helpas al ili nur tro malforte. La novaj esperantistoj esperas, ke la antaŭmilitaj grupanoj frekventos la kunvenojn de tempo al tempo por tiujn ĉi briligigi per siaj spertoj kaj konsiloj, same kiel la junuloj mem jam promesas fari en la estonteco, por ke ne rompiĝu la generacia ĉeno tiel dezirita de D-ro L. L. Zamenhof.

J. Fayot

(El cirkulero de la Pariza Esperantista Grupo.)

DE PORTUGALUJO ĜIS FINNLANDO!

Bertram Potts prelegvojaĝis
tra Eŭropo!

UZIS ESPERANTON ĈIE!

„Kiam niaj kunpasaĝeroj rigardis niajn valizojn kun ties kalejdoskopa elmonro da hotelaj etiketoj el ĉiu vizitita lando, ili diris, ke ni estas la plej multe vojaĝintaj turistoj en Eŭropo!” diris s-ro Bertram Potts, kiam li kun sia ĉarma esperantoparolanta edzino fine atingis Londonon komence de Aprilo, 1957. „Kaj kiam ni informis ilin, ke mi faris paroladojn en ĉiu lando, uzante nur Esperanton, ke ni ne spertis lingvan problemon, kaj ke ni ĉiam sentis nin kvazaŭ en Novzelando, ili vere malfermis la okulojn kaj inundis nin per demandoj!”

Bertram Potts, emerita ĵurnalisto el Wellington, Nov-Zelando, honorofica dumviva prezidanto de la N.Z.E.A., redaktoro de la „New Zealand Esperantist” (oficiala organo de N.Z.E.A.), kaj dumviva membro de U.E.A., komencis sian vojaĝon ĉirkaŭ la mondon la 19-an de januaro, 1956, en Wellington, la ĉefurbo.

Post tri tagoj kaj duono ilia vaporsipo, kiu ekiris de Aŭklando en la nordo de la lando, atingis Aŭstralion. Afable akceptis lin kaj lian edzinton la samideanoj de Sydney. De tie ili forvojaĝis per la „Neptunia”, itala vaporsipo, la 11-an de Februaro, 1956. Egale larĝbrake akceptis ilin la esperantistoj de Melbourne kaj Perth.

La 19-an de Marto la ŝipo atingis la celhavenon, Genova, kie s-ro Managlia bonvenigis ilin ĉe la kajo en la nomo de U.E.A., kaj de la Itala Esperanto-Federacio. Tiun nokton ili pasigis ĉe samideano en Luzern, Svislando, survoje al Būbingen, apud Saarbrücken, Saarlando, por pasigi monaton ĉe malnova amiko.

La unua parolado okazis la 25-an de Marto, 1956, en Saarbrücken, dum la ĉiujara kunveno de la Saarlanda Esperanto-Asocio; poste sekvis du aliaj en apudaj urboj.

La 16-an de Aprilo ili atingis la urbon Torino preskaŭ noktomeze, por komenci la italan prelegvojaĝon. „Ni alvenis du horojn post la tempo, kiun mi anoncis per letero,” diris s-ro Potts. „Neniu atendis nin sur la perono. Ni sentis nin forlasitaj, solecaj! Mi vagis al la elirejo, por serĉi telefonan budon-kaj tie, pacience atendente, estis tridek ĝesamideanoj, kiuj donis al ni neforgeseblan varmkoran akcepton. Tiu ne estis la sola emociiga bonvenigo, kiun ni spertis dum nia vago da tra multaj landoj!”

Pli ol sep semajnojn ili vojaĝis tra Italujo, parolante en ŝtataj lernejoj, urbaj universitatoj kaj akademioj, ĉe kultur-asocioj, ĉe esperantaj kursoj kaj rondoj, kaj vizitante samideanojn en Torino, Varese, Milano, Como, Voghera, Pistoia,

Firenze, Pisa, Roma, Napoli, Bologna, Mantova, Mirandola, Verona, Vicenza, Padova, Cittadella, Venecio, Azzano Decimo, kaj Trieste. Doloran sperton suferis s-ro Potts, kiam ŝi falis malsupren sur ŝtuparo en Roma, kaj devis ricevi kuracistan traktadon en Napoli, Bologna, Venecio, kaj Azzano Decimo. El 32 paroladoj, dek estis tradukitaj. Dum li estis en Bologna, la lokaj samideanoj aranĝis prelegon en la granda foiro. Pli ol cent homoj aĉestis en la foira salono kaj atente aŭskultis absorban paroladon pri la strangaj kutimoj de la antaŭe primitiva raso en Nov-Zelando. La parolado estis lerte tradukita frazon post frazo. Sur la podio troviĝis la direktoro de la foiro, kiu afable prezentis nian amikon.

Kiel rezulto de la prelegvojaĝo aperis raporto en almenaŭ 35 italaj gazetoj kune kun multe da longaj artikoloj pri la temo de la prelegoj kaj pri Esperanto.

Sekvis sep semajnoj en Jugoslavujo kun paroladoj en Rijeka, Ljubljana, Kranj, Logatec, Pula, Trbovlje, Rogaska Slatina, Maribor, Celje, Zagreb, Bjelovar, Zenica, Serajevo, Kruševac, Svetozarevo, Zemun kaj Beograd kun gazetaj intervjuoj kaj radio-paroladoj. „Mi kredas, ke la tuta klubo en du urboj — Bjelovar kaj Kruševac — atendis nin en la stacidomo, kun paroladoj, bukadoj kaj fotografado. Ne nur la esperantistoj ĉirkaŭis nin, sed homamaso, kiu volis vidi, kiu ricevas tiel reĝan bonvenigon!” diris s-ro Potts ridetante.

El 22 paroladoj dek estis tradukitaj en diversajn jugoslavajn lingvojn. Kiel en Italujo okazis ĉi tie intervjuoj kun multe da artikoloj pri Esperanto kaj pri la esperantoparolantaj ĝevizitantoj el la fino de la mondo. „En Celje,” diris s-ro Potts, „la ĵurnalistoj petis, ke mi helpu ilin, post reveno en Nov-Zelando, trovi la nomojn de du nov-zelandaj herooj, kiuj mortis kune kun partizanaĝ gekamaradoj al kies memoro nun staras monumento apud Celje!”

La 26-an de Julio ĝes-roj Potts komencis senhaltan vojaĝon ĝis Frostavallen, Svedujo, kie ili estis gastoj de la Sveda Somera Semajno. Ĉi tie en la distraj programoj s-ro Potts prezentis kelkajn amuzajn originalajn monologojn, inkluzive la neforgeseblan rakonton pri „La Akuzativa Maŝino”.

Ĉe la 41-a Universala Esperanto-Kongreso, Kopenhago, li reprezentis Nov-Zelandon, salutante en la nomo de la N.Z.E.A. kaj de la Ĉefministro de Nov-Zelando, s-ro S. Holland.

Post ripoza periodo ĉe amiko en Belgujo komenciĝis la vojaĝo tra Germanujo de la 21-a de Septembro ĝis la 10-a de Decembro, jene: Krefeld, Essen-Brebenej, Gladbeck, Düsseldorf, Bonn, Köln, Dortmund, Hagen, Essen, Münster, Osnabrück, Bremen, Hamburg, Berlin, Braunschweig, Hannover, Niedermarsberg, Marburg, Frankfurt A/M, Wiesbaden, Mainz, Kaiserlautern, Neustadt, Mannheim, Heidelberg, Bensheim, Nürnberg, Augsburg, Weilheim, kaj Mün-

chen. El 33 paroladoj nur du estis tradukitaj. Denove la nacilingva gazetaro aperigis serion da artikoloj, intervjuoj kaj fotografajoj. „Anstataŭ tri semajnoj ni restis preskaŭ tri monatojn!” klarigis s-ro Potts. „Ĉie ni trovis esperantistojn kaj ili petis, ke ni restu pli longe kun la rezulto, ke ni devis mallongigi nian restadon en ĉiuj el la sekvantaj landoj, ĉar ni volis troviĝi en Britujo komence de aprilo, 1957!”

En Aŭstrujo ili vizitis Salzburg, Linz, Vienna, Graz, Villach kaj Innsbruck. Sekvis Svisujo, kie ilia programo povis inkluzivi nur Zurich, Lausanne, kaj Genève. En suda Francujo survoje al Hispanujo, ili troviĝis en Lyons, Grenoble, Nice, Marseille, antaŭ ol transiri la landlimon ĝis Barcelona, Valencia kaj Madrid. „Estis same, kiel ĉie,” rimarkis la preleganto, „la samideanoj volis, ke ni longe restu, ke ni vizitu aliajn urbojn. Bedaŭrinde, en Portugalujo, pro manko de tempo, ni povis paroladi nur en Lisboa, malgraŭ la petoj kaj neforgeseble varma bonvenigo de la samideanoj!”

Antaŭen tra Hispanujo ĝis Francujo, kie ili vizitis Bordeaux, Tours, Orleans, Paris, Calais, kaj Lille. En Paris s-ro Potts paroladis pri Nov-Zelando en la Sorbonne.

Belgujo sekvis kun multe da feliciaj rememoroj de Brussel, Gent, Brugge, kaj Antwerpen, antaŭ ol komenci la prelegvojaĝon tra Nederlando, jene: Utrecht, Hague, Scheveningen, Haarlem, Rotterdam, Arnhem kaj Amsterdam. „Konstante la samideanoj demandis nin,” diris s-ro Potts, „ĉu ni ne laciĝas, irante de loko al loko, loĝante en valizoj! Kiu povas laciĝi inter la samideanoj! Ili atendis nin en stacidomoj kaj kortuŝe prizorgis nin dum nia restado! Estis ankaŭ multe da vidindaĵoj. Ni sentis nin hejme — ni volis pli longe resti, sed estis ne eble. La tempo flugis!”

En Danlando la programo enhavis la urbojn Fredericia, Silkeborg, Vejle, Odense, Svendborg, Holbaek, Aarhus, Randers, Odder kaj Kopenhagen.

La veturlinio transiris la maron ĝis Svedlando. Bonvenigis ilin la samideanoj de Malmö kaj Stockholm. Ankaŭ unufoje trans la maron, la glaciĝintan Baltan Maron, kiu estis mirinda sperto por niaj antipodanoj survoje al Finnlando. Ĉi tie ili vizitis Helsinki, Tampere kaj Lappeenranta. Kvinfoje okazis intervjuoj kun la gazetaro, kiel ankaŭ en ĉiu trapasita lando senescepte. „Ni renkontis en Helsinki kun granda plezuro la Ministron por Sociaj Aferoj, s-inon T. Leivo-Larsson, kiu ankaŭ estas Vic-Ministro por Edukado,” diris s-ro Potts. „Ŝi flue parolas Esperanton kaj esperas, ke venos la tago, kiam diversaj landoj enkondukos Esperanton en la lernejojn!”

Denove per vaporsipo tra la glacio ĝis Stockholm, por daŭrigi la prelegvojaĝon tra Svedujo, jene: Upsalla, Borlänge, Falun, Hagge, Örebro, Karlskoga kaj Karlstad, antaŭ ol viziti Norvegion, la lastan landon sur la longa vojaĝplano. Paroladoj okazis en Oslo, Kristian-

sand, Stavanger, Haugesund, kaj Bergen.

La sekvantan tagon, la 30-an de Marto ges-roj Potts foriris per ŝipo de Göteborg, Svedujo, kaj atingis Londonon la 1-an de Aprilo, 1957, pli ol unu jaron post la komenco de ilia streĉita prelegvojaĝo sub aŭspicio de U.E.A.

„Mi trovis,” diris s-ro Potts, „ke Esperanto estas vere larĝe disvastigita en Eŭropo, tiel larĝe, tiel firme, ke tute ne estis necese por ni uzi la anglan lingvon! De tempo al tempo, kiam ni vagis for de la esperantistoj kaj faris demandon anglalingve, neniu scipovis tiun lingvon! Ni eĉ ne renkontis kelneron en la tri grandaj skandinavaj landoj, kiuj komprenis! Sendube Esperanto estas survoje al sukceso, sed ĉiu samideano devas fari sian eblon en sia propra loko, por helpi antaŭenigi nian karan aferon. La vojo estas ankoraŭ longa, sed iom post iom ni atingos la celon!

„Ni transpasis multe da landlimoj, sed ni daŭre uzis la saman simplan lingvon, Esperanton, kiun ni uzis ĉiutage en malproksima Wellington. Inter la samideanoj ni neniam sentis, ke ni estas alilandanoj, aŭ ke ni troviĝis inter alilandanoj. Ŝajnis al ni, ke ni estis en iu nekonata parto de Nov-Zelando!

„Mi volas kapti la nunan momenton, por danki, en la nomo ankaŭ de mia edzino, s-ron Jan Strönné, la organizanton de mia prelegvojaĝo, kaj la lokajn aranĝantojn, kaj la centojn kaj centojn da geamikoj, kiuj tutkore helpis nin dum nia longa vojaĝo. Ne estis eble korespondi dum nia irado. Ni havas neforviŝeblajn rememorojn kaj faros nian eblon post hejmenveno proksiman septembron skribi personajn dankojn!”

Post tri monatoj en Britujo kaj du monatoj en Usono, ges-roj Potts estos hejme en Wellington proksimume la 18-an de septembro, 1957.

Grava informo al juristoj-esperantistoj

En la pasinta jaro mi iniciatis la kreon de internacia faka organizaĵo de juristoj-esperantistoj. En la revuo „Esperanto” aperis pri tio alvoko, al kiu favore respondis pluraj gekolegoj el diversaj landoj. Nun la afero tiel maturiĝis, ke dum la 42-a Universala Kongreso de Esperanto en Marseille okazos fondkunveno de Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj. La projekto de la statuto estas jam preta kaj ĝi estos prezentita al la fondkunveno por akcepto. Ĝi estos ankoraŭ sendita al ĉiuj kolegoj, kiuj jam anoncis sin aŭ kiuj anoncos sin al la subskribinto antaŭ la kongreso en Marseille.

Mi afable petas ĉiujn juristojn, kiuj ĉeestos la Kongreson, partopreni en la laboroj de la fondkunveno (pri la dato kaj horo vidu la kongresan programon). Tiujn kolegojn, kiuj ne povos ĉeesti la Kongreson kaj kiuj ankoraŭ ne anoncis sin, mi petas skribi eble nur poŝtkarton al mi, se ili interesiĝas pri la membriĝo al la nova asocio. Mi atentigas, ke laŭ la

projekto de la statuto ordinara membro de la asocio povos esti ĉiu persono, kiu diplomatiĝis en Jura Fakultato aŭ samranga alta lernejo kaj kiu parolas la Internacian Lingvon, dum eksterordinara membro povos fariĝi ĉiu esperantisto, kiu estas studento de juro, aŭ kiu laboras en juĝejo, tribunalo, advokata aŭ notaria kancelario, aŭ en simila jura institucio.

Prof. D-ro IVO LAPENNA
Jura konsultisto
77, Grasmere Avenue,
Wembley, Middlesex, Britujo

Zamenhofaj tagoj en Varsovio

Ĝuste 40 jarojn post la morto de la granda kreinto de Esperanto la 14-an de aprilo en la jaro 1957 kunvenis ĉe lia tomo multaj varsoviaj gesamideanoj kaj reprezentantoj de dekelkaj Filioj de Asocio de Esperantistoj en Pollando, kiuj alvenis Varsovion por partopreni kunvidon de la Asocia Konsilantaro. Ne pluvigis kiel dum la enterigo de Zamenhof, la matena suno printempe varmigis la kolektintojn por honori sian Majstron kaj la duonforlasita, ruiĝinta juda tombejo en Varsovio akceptis preskaŭ festan aspekton. Post la modesta tombomunimento „starigita de la tutmonda esperantistaro” kiel ĝusta fono de la okazonta solenaĵo staras granda verda flago esperanta. Inter la kunvenintoj reprezentantoj de la Pola Gazetaragentejo, ĵurnaloj kaj televido notas programon de la solenaĵo.

Kaj fine, en sufiĉe frua horo pro la Konsilantaro, komenciĝas la modesta, sed enhavoriĉa ceremonio. Membroj de la Ĉefa Estraro de la Asocio surmetas sur la tombon de la Geniulo belan florkronon kiel signon de la dankemo kaj profunda ŝato. Poste sekvas bela florkrono de Juda Kulturkleriga Societo en Polujo.

En la nomo de Ĉefa Estraro de Asocio de Esperantistoj en Pollando parolas vicprezidanto red. Jan Zawada. Poste kurtuŝe parolas en la nomo de svedaj kaj tutmondaj geesperantistoj s-ino Anna Alamo-Sandgren (Svedujo), kiu surmetas sur la tombon florbukedon kun svedaj nacikoloraj rubandoj. Kiel la lasta parolas ĉefdelegito de UEA, unu el la plej maljunaj polaj samideanoj, s-no Roman Sakowicz. Kanto de la himno finas eble tro modestan solenaĵon. Ankoraŭ kelkaj fotografioj, de la junularo kun la verda standardo, de aliaj, ĉe la tomo kaj ree morta silento ekregas la tombejon.

La 13-an de aprilo la Pola Radio en la vespera ĵurnalo parolis pri Zamenhof kaj Esperanto. La 14-an de aprilo en la radikalendaro estis disaŭdigita artikoleto pri Zamenhof kaj vespere dum la radiĵurnalo oni informis pri la solenaĵo. La televido prezentis la 20-an de aprilo la solenaĵon. Ankaŭ ĵurnaloj raportis.

La 14-an de aprilo post la solenaĵo okazis kunsido de la Konsilantaro de la Asocio, kiun partoprenis la Ĉefa Estraro, membroj de la Konsilantaro, elektitaj dum la Kongreso kaj prezidantoj de dek-

kelkaj Filioj. (Bedaŭrinde ne ĉiuj Filioj estis reprezentitaj.) S-no mag. Isaj Dratwer, ĝenerala sekretario de la Asocio prezentis la agadraporton ekde al la landa Kongreso. Evidentiĝis, ke malgraŭ ankoraŭ ekzistantaj malhelpaĵoj la esperanta movado en Polujo tre bone disvolviĝas kaj akiras ĉiam pli grandan komprenon ĉe la pola socio.

Lunde la 15-an de aprilo okazis kunveno de membroj de la Varsovia Filio dediĉita al la 40-jara datreveno de la mortotago de Zamenhof. La saman tagon en la nokta radiĵurnalo estis mencio pri tiu ĉi aranĝo.

La 16-an de aprilo parolis s-ino A. Alamo-Sandgren pri Svedujo en la Klubo de Internacia Gazetaro kaj Libro. Ankaŭ estis prezentita filmo pri Svedujo. La saman prelegon ŝi ripetis la 18-an de aprilo en la Palaco de Junularo en Varsovio.

S-ino Anna Alamo-Sandgren prelegis en kelkaj urboj de Polujo iŝteralie en Gdansk, Lodzo, pliviglante la pollandan esperantan movadon. Eksterlandaj Elsendoj de Pola Radio intervjuis s-inon Alamo-Sandgren.

La 23-an de aprilo „Sur la Varsovia Ondo”, Fako de Pola Radio disaŭdigis intervjuon kun prezidanto de Varsovia Filio de Asocio de Esperantistoj en Pollando s-no inĝ. Tadeusz Pleskaczyński pri la agado de la Filio kaj pri Esperanto.

La Zamenhofaj tagoj finiĝis, sed vivos la grandaj idealoj de Zamenhof inter la pollanda esperantistaro. Isaj Dratwer

ESPERANTISTA VIVO

Naskigo

Aldeguer. Al Concepción kaj José Aldeguer (Torrente Vidade 42,1°, Barcelona 12, Hispanujo) naskiĝis filino Concepción Margareto, la 3an de aprilo 1957, gefratetoj Maria Dolores kaj José Vicente bonvenigis.

Fianĉigo

Gefianĉigis la 5an de marto 1957, Friedgard Wuchert (Oberweid) kaj Fritz Lautenbach (Fulda).

Geedziĝoj

Fischer-Korthals. S-ano Horst Fischer, Saarbrücken, Sarlando, Germ., kaj s-ino Edeldgard Korthals el Gevelsberg, Vestfalia, Germanujo, geedziĝis la 2-an de majo.

Grattapaglia-Sandkühler. Geedziĝis la 8an de majo Giuseppe Grattapaglia el Torino, Italujo, kaj Ursula Sandkühler el Berlino, Germanujo.

Müller-Eggeling. Heinrich Müller kaj Irmgard Eggeling (Mommstr. 5/I, Hannover, 5, Germanujo) geedziĝis la 5an de aprilo.

Swarsensky-Skljar. En Tel-Aviv, Israelo, la 11an de aprilo, geedziĝis Kelenimus (Bernhard) Swarsensky kaj Lea Skliar.



Fernando Ramizes Osorio *Fiŝistinoj*



Jose Chaves Morado:
Al la ŝtonminejo



Elena Corta

Monda Galerio:

Meksika pentroarto

Al la legantoj ni prezentas kelkajn bildojn de meksikaj pentristoj.

Malproksime de Eŭropo kaj Azio, antaŭ centoj da jaroj, sur la amerika kontinento kreskis kaj prosperis granda kaj originala kulturo. Pri ĝia ekzisto, la tiama, konata al ni mondo, eĉ ne suspektis. Kaj ankaŭ niaj samtempuloj malmulte konas kaj povas ekscii pri ĝi.

Tiu kulturo, rezulto de la malkovro kaj la uzo de la maizo, kreis mirindajn verkojn: multkoloran arkitekturon, skulptaĵojn kaj pentraĵojn. Tio estis la kulturo de la maioj, inkaoj kaj actekoj.

La naturo kaj la tempo en la malproksima pasinto, kaj la barbareco de la hispanaj konkerantoj pli poste, preskaŭ plene detruis tiun kulturon. Nun, pri ĝia amplekso kaj karaktero ni povas juĝi nur per la restintaj ruinoj.

La krea forto tamen de la popoloj, kiuj estigis tiun kulturon ne tute perdiĝis. Ĝin heredis la meksika popolo, kiu rezultis de la miksiĝo de la indiĝenaj kun la hispana popoloj.

Eble, dank'al tiu heredaĵo la meksika popolo montras rimarkindan pentroartan talenton. Ĝia pentroarto atingis la plej altajn suprojn de la majstreco.

En tiu lando, kie la plimulto el la loĝantaro estas ankoraŭ analfabeta kaj kie oni parolas pli ol 80 indiĝenajn idiomojn, la pentristoj serĉis rimedon por kontakti kun la popolo kaj tian rimedon ili trovis en la pentroarto. Kun tiu ĉi,

esprimkapabla, efika, kaj por ĉiuj komprenebla rimedo, la multnombraj, vere talentaj pentristoj partoprenis nedisigible la popolan vivon.

Kaj, ĉar tiu vivo estas peza, malfacila, kun malmulte da ĝojo kaj multe da suferoj, pasas dum longaj periodoj en sklaveco kaj en bataloj kontraŭ diverspecaj tiranoj, la pentristoj respugulis nome tiun vivon. Jen pro kio, tute ne estas mirinde, ke la koloroj en iliaj bildoj ne ĉiam estas helaj.

Rigardante la pentraĵojn de la meksikaj pentristoj, ni facile povas konstati, ke la pentristoj ne estas flankaj observantoj de la popola vivo kaj batalo. Tute ne. Kontraŭe, ili estas senperaj partoprenantoj en tiu vivo kaj batalo. Alie, ili ne povus krei tiajn majstrajn verkojn, saturitajn kun ardo kaj pasio. De tiuj verkoj ni klare vidas kion la pentristoj defendas, pri kio ili pledas, kontraŭ kio indignas, kontraŭ kio kaj kontraŭ kiu protestas, al kiu simpatias, kiun konsolas, kiun subtenas, kiun inspiras kaj al kio, kiun eternigas per siaj bildoj kaj pro kio.

Ni vidas, ke temas ne pri distro kaj amuzo, sed pri vivo kaj arto; arto, kiu servas al la vivo, al la justo, al la libero, al la progreso.

Kaj al tiaj verkoj kaj al iliaj kreantoj ni povas modeste fari riverencon kaj admire diri: Brave homoj! Restu tie, kie vi estas!

M. P.



Leopoldo Mendez:

La sklaveco de la Indianoj

Sinjoro Birg

Kelkaj el miaj amikoj diris al mi, ke mi bonvolu noti ĉi tiun rakonton, kvankam jam pasis pli ol dek jaroj, de kiam mi travivis ĝin. Mi estis tiam ĉasgardisto ĉe sinjoro Birg en la vilaĝo Hörstelsbach; sed mi restis nur kvar jarojn, ĉar la sinjoro poste mortis. Mi memoras kelkfoje ankoraŭ pri tio, ĉar estis bona laborloko, kiun mi havis, kaj ankaŭ pri tio, ke el ĉiuj miaj ĉasestroj neniu estis tia, kia sinjoro Birg.

Li estis sperta pri la ĉasado kaj en lia servo oni devis lerni sufiĉe multe; sed li ne plu multe ŝatis la ĉason, estante iom astma kaj vastkorpa. Li estis bonhava kaj ne bezonis ŝpari kiel mi. Krome li havis aŭton, per kiu li povis veturi ĉiuloken, tiel ke li ne plu havis emon piediri. Kelkfoje li rigardis apenaŭ la neĝon sur la tero kaj tuj diris: „Ni havas mustelon en la ĉasdistrikto”. Aŭ li diris: „Tie ĉi estas bona loko por kapti vulpojn.” Pri ĉi tiu afero li havis tre bonajn konojn, kiel mi poste eksciis. Sed ĉiun ĉasadon, kiu streĉis la fortojn kaj kiu okazis dum malvarmo, li lasis al mi. Li nepre ne ŝatis, iri tra amaso da neĝo. Plej multe mi miris, ke li nenial volis ĉasi sola; mi devis ĉiam ĉeesti. Kiam li estis en embusko, mi devis resti almenaŭ proksime, por ke lia voĉo povu atingi min laŭbezone kaj devis alkuri tuj post la pafon. Unue mi opiniis, ke li ne havas emon senviscerigi ĉasbeston, kiel mi tion ankaŭ spertis ĉe aliaj sinjoroj; sed poste mi rimarkis, ke li havas timon resti sola. Iufoje li venis ree el la urbo kaj deziris, ke mi iru kun li. Sed fulmotondro troviĝis malantaŭ Hörstelsbach, kaj mi devis antaŭe enveturi fojnon, kiun mi havis sur la herbejo apud mia domo kaj kiu estis destinita kiel dumvintra nutraĵo por la ĉasbestoj. Mi petis lin, ke li do pafu la beston kaj ĝin simple lasu kuŝanta bonkaŝite. Mi estis preta iri tien dumnokte kaj ĝin senviscerigi kaj forporti. Sinjoro Birg ŝajnis, kvazaŭ li konsentus, sed post duonhoro li revenis, restis staranta, rigardante mian laboron, sen diri ion ajn.

Poste alvenis la fulmotondro kaj ni sidis kune en la restoracio. Sinjoro Birg rakontis al mi denove pri Kanado, kien li estis forveturinta post la granda milito, ĉar li deziris, „havi bonan aeron”, kiel li diris. Unue mi opiniis, ke ĉio estas blufado, kion li rakontis al mi pri la vivado kiel kaptivisto en la praarbaro, kiam mi rigardis lin jen sidanta kun sia ventro kaj siaj okulvitroj. Cetere mi ne povis supozi, ke li iam longtempe estis vivanta en soleca primitiva trunkdometo. Sed iom post iom mi devis tamen kredi al li, ĉar ĉio akordiĝis, kion li diris, kaj krom tio li sciis tiom da detalaĵoj, kiujn oni ne povas bone elpensii. Se mi devas cetere

klarigi, kial ĉi tiu sinjoro tiom satis, sidi kun mi, kvankam mi estis nur ĉasgardisto. La kaŭzo ne estis, ke li emis trinki kaj havi iun ĉeestanton, kion mi travivis aliloke. Li diris al mi, ke mi bone aŭskultas kaj povas ion imagi dum lia rakontado. Mi estis ĉiam bonega lernanto, kvankam mi fariĝis nur ĉasgardisto kiel mia avo de la patrino flanko. Ankaŭ poste de tempo al tempo mi legis librojn. Kiam sinjoro Birg jam estis mortinta, mi ricevis unu fojon libron pri Kanado kaj leginte ĝin, mi konvinkiĝis, ke li efektive diras en ĉio la veron. Mi estis konstatinta ekzemple, ke en Kanado ekzistas fakte Pelikan-Kataraktoj. Sinjoro Birg nomis iufoje ĉi tiun birdomon, kiam ni staris apud la toronto en frajo-fosaĵo. Li diris: „Apud Pelikan-Kataraktoj oni ne povas kompreni la propran parolon; tiel forte tie la bruo mugas. Ĉi devas scii, ke estas malfacile veni transen, precipe kiam ekzistas flosanta glacio. (Sinjoro Birg kelkfoje ĉi-diris al mi, alie li min vi-alparolis.) Sed ni devis transiri, ĉar ni estis starigintaj kelkajn ferkaptilojn sur la alia bordo. Unufoje preskaŭ mi estus drovinta, kaj mi ne sidus ĉe vi, se Tore ne estus kaptinta min lastmomente.

Pri la norvego, kies nomo estis Tore, parolis sinjoro Birg pli ofte. Li estis renkontinta lin en Kanado kaj vivinta kun li en praarbaro. Kelkfoje estis necese, ke ili kampadu en libera aero ĉe 30 frostgradoj, kiam ili reviziis siajn kaptilojn. Tie ne estas tiel malgrandaj distriktoj kiel ĉe ni, en kiuj oni alvenas al la kaptilo almenaŭ ĉiun duan tagon. Tie multaj tagvojoj estis necesaj, ĝis kiam ili estis kontrolintaj ĉiujn kaptilojn. Sinjoro Birg estis rakontinta al mi ofte, kiamaniere ili disfendis defalintan lignon kaj ĝin surmetis unu sur la alian kun musko miksitaj. Poste oni submetis kandelon, ĉar iliaj manoj estus frostiĝintaj se ili estus devintaj lumigi plurfoje alumetojn. La „Höskies”, kiel sinjoro Birg nomis la sledhundojn, dormis en neĝkavo lasinte neĝkovri sin. Ĉi tiuj estis pli



persistaj ol niaj harditaj ĉashundoj. Sed la homoj ne estis kutimiĝintaj al tio.

Sinjoro Birg kaj Tore devis komune varmigi unu la alian kaj ĉiuj iliaj kovraĵoj apartenis al ili komune. Tiam amikon oni certe ne povas facile forgesi. Okazis al sinjoro Birg, ke li alparolis min senintence per la nomo „Tore”. Iufoje li estis pafinta al vulpo, kiam tiu ĵus elrigardis el la kaŝejo kaj kompreneble la vulpo reĝliĝis malgrandan distancon antaŭ ol fari sian testamenton. Kiam mi intencis eltiri ĝin el la kaŝejo kriis sinjoro Birg: „Atentu, Tore, ĉi ja eltiras la voston de la vulpo!” Do tio povis okazi. Sed mi ŝajnis, kvazaŭ mi estus vokita per la ĝusta nomo, kaj mi opinias, ke sinjoro Birg tute ne rimarkis ĉi tiun interŝanĝon. Mi estis efektive fiera pri tio.

Sed kelkajn aferojn, kiujn sinjoro Birg tie rakontis al mi, tamen mi ne povis ĝuste kompreni. Iufoje li diris al mi: „La vivo en la praarbaro estas tiel soleca, ke ĝuste la sola homo, kun kiu oni kunvivu, povas frenezigi onin.” Tio ŝajnis al mi tre stranga. Aŭ li diris al mi: „Jen vi sidas vid-al-vide kun mi, mia Brandel, kaj vi estas al mi tute ne malgrabila, kredeble male. Sed kiam mi imagas, ke mi devus rigardi la denaskan makulon sur via dekstra vango en ĉiu tago, tiam mi povas pensi, ke tio furiozigus min.” Tion aŭskulti ne estas agrable al mi, sed li klarigis tion tuj al mi: „Tion oni nomas la „nordlandan furiozon” vi devas scii. Tiam vi povas la solan kunulon, kiun vi havas tie en la sovaĝa regiono, nepre ne plu rigardi, por ne havi la inklinon mortigi lin.” Mi volis scii, ĉu li spertis similan maniere koncerne al Tore. Sekve de mia demando li preskaŭ eksciĝis: „Similmaniere? kial vi demandas tiel malsaĝe? Min atakis Tore iufoje per hakilo, dirante, ke mi montras tiel malsaĝan ridon survizaĝe”... Samtempe sinjoro Birg iomete ridis, kvazaŭ montris al mi, kia estis la rideto tiam, kaj liaj manoj ŝoviĝis sur la tablo tien kaj tien. Plue li daŭrigis: „Certe ja diversaj malfeliĉoj okazis en praarbaro, kvankam neniu homo en la mondo sciigis pri tio. Jen ekzemple iu persono prenas sian revolveron kaj krias: „He hundo, ĉu vi volas mortigi min per hakilo? kaj poste li tute ne povas kompreni, kial la alia en la sama momento ruliĝas sur la tero”. Eksterordinare kurioza sento kaptis min, kiam sinjoro Birg tute eksciite rakontis tion. Sed poste li diris malpli laŭte: „Sed tiaj malfeliĉoj estas eviteblaj; oni povas esti ankaŭ prudenta kaj disiĝi sufiĉe frue.”

Kiam li diris tiajn rakontojn, mi preskaŭ ne riskis, rigardi lian vizaĝon. Li tiam estis tute ŝanĝita. Sinjoro Birg havis ĝenerale rondan vizaĝon kovritan de ruĝbluaj vejnetoj, kaj liaj malgrandaj malhelaj okuloj malantaŭ la okulvitroj rigardis tre afable. Sed kiam li parolis pri sia „nordlanda furiozo”, tiam li havis sub sia vizaĝo krome alian, tio volas diri, maldikan kaj pintan, pro kiu oni povis timi. Kelkfoje mi devis supozi, ke ekzistas en sinjoro Birg tute alia viro, kiun mi ne

konas. Tiu estas la viro, kiu atakis Tore-on per la revolvero.


Sed kial mi plu zorgu pri la afero? Ĉiuj ĉasestroj havas siajn fiksideojn, kiujn oni devas ĝuste koni, por ke oni harmoniu kun ili. Nuntempe sinjoro Birg estis ĉiokaze astma kaj timis la solecon, kaj ankaŭ la denaska makulo sur mia dekstra vango ne ĝenis lin cetere. Ni harmoniis unu kun la alia, kaj ankaŭ mi sidis volonte kun li en la restoracio, kiam li rakontis pri alkoj kaj neĝkaproj kaj nordaj cervoj en la praarbaro kaj montaroj, en kiuj simpla homo kiel mi neniam havus permeson ĉasi.

Mi estus restinta ankoraŭ longatempe en ĉi tiu laborloko, se sinjoro Birg ne estus mortinta subite. Li mem sciis, ke la morto lin havas jam sur sia ĉaslisto, sed mi devas ankoraŭ rakonti, kiamaniere okazis, ke mi tion eksciis. Komence de Junio li sidis apud Blurivereto embuske al vircervo, kiu havis malsanan gambon kaj pro tio estis forigenda. Mi restis ree en vokdistanco ĉe rando de alnareto. Subite krakis pafo kelkcentmetrojn pli fore trans la Blurivereto. Certe la pafinto estis ŝtelĉasisto kaj mi eksplodis pro kolero, ĉar okazis la unuan fojon, ke mi rimarkis en ĉi tiu distrikto ŝtelĉasiston. Mi kaŝiris al la celpunkto de l'pafo, sed mi malfruiĝis. Ĝuste mi vidis ankoraŭ, kiel la fiulo rapidis trans la limon. Do oni nenion povis plu fari hodiaŭ, kaj mi tuj reiris al sinjoro Birg. Ĉi tiu jam renkonte alpaŝis min ekscitite, alparolante min bruskvorte. Mi diris, ke mi estas vidinta la ŝtelĉasiston, sed li min alkriis: „Ĝuste pro tio mi estas en flamanta kolero. Tial mi ja malpermesis al vi, ke vi foriru ekster la voĉaŭdeblo.” Momente mi estis tute konfuzita pro ĉi tiu alparolo. Kiam ni veturis al la vilaĝo, la plenluno leviĝis super la piccoj. Sinjoro Birg subite haltis kaj fiksigardis la sangruĝan diskon, kvazaŭ li

estus lunatika. Li diris: „Vi neniam foriru de mi ekster la limo de aŭdebla voĉo, mia Brandel. Miaj nervoj suferis transe en la praarbaro. Tie oni povas esti pafmortigita tro facile. „Poste li ridis iomete, sed mi bone rimarkis, ke li tute ne estas ridema. Li reekmovis sian aŭton kaj mi diris al li, ke ĝis nun oni neniam ŝtelĉasis ĉe ni. La fiulo de la hodiaŭa vespero estas veninta sendube de malproksime. Kaj mi certe klopos, ke li ne plu ofte aperos ĉe ni. Sed sinjoro Birg laŭŝajne ne aŭskultis; li nenion respondis, dirante nur: „Bonan nokton!” kiam li elaŭtigis min en la vilaĝo.

Mi pensis, ke tio estas restaĵo el Kanado, por tiel diri, finresto de la „nordlanda furiozo”. Oni ne devas foriri de li, tiam li certe forgesos siajn pesimistajn pensojn. Oni povis prave diri, ke la ŝtelĉasisto ne estis timindaj ĉe ni. Ili estas maloftaj kaj tute ne tiel danĝeraj kiel en la montaro, kie mi jam estis ankaŭ ĉasgardisto. Sed sinjoro Birg ja sciis, ke la morto jam celas al li.

Estis dum somerfino kaj mi estis enveturinta postfojn dumtage. Tiam iuvespere venis sinjoro Birg kaj iris kun mi al la distrikto por pafi maljunan vircervon. La surarba embuskejo estis sufiĉe larĝa por ni ambaŭ. Ni sidis jam iomete da tempo, kaj sinjoro Birg viŝis la ŝviton ree kaj ree de la frunto ricevitan dum la mallonga iro surmonten de la aŭto al la surarba embuskejo. Jen ree tondris pafo en la sama regiono kiel lastfoje. La sango alfluis al mia vizaĝo, sed mi restis sidanta, ĉar mi pensis al la akraj paroloj, kiujn la sinjoro tiam estis doninta al mi. Poste li diris al mi je mia granda miro, ke ni tuj veturu tien; alie la ŝtelĉasistoj komencus senti sin hejme ĉe ni. Dirante tion li rigardis min tiel moke, ke la sango alfluis al mia vizaĝo. Samtempe li prenis la pafilon kaj la dorsakon kaj komencis rapide malsupreniri la ŝtupetaron. Mi



Malnova Korsiko, celo de la postkongresa ekskurso.

Postkartoj de Turisto

Utaoj de B. Losada

En Firence

Dante — grandega
turisto de la flamoj —
unu demando:
Kiom da damnituloj
nun havus l' Infer' via?

En Venecio

Kolombumhoru.
Kaj kiom da kolomboj
el sola paro?
La vivo certe havas
signon de multipliko.

En la trajno

Malkompreniĝo
de la komenc' kaj ĉiam.
Ĉu revemuloj
estis Zamenhof, Gandhi,
de l' espero gigantoj?

En la aviono

Fajroŝton', sago,
poste la fer', la pulvo,
la dinamito.
Ĝis kiam, hom'? L'atomo
vundita jam protestas!

Aviono: aviadilo

volis voki al li, ke li ankoraŭ ne malŝarĝis la pafilon. Sed estis ja tro malfrue. Li maltrafis la duan ŝtupeton, elglitis kaj li falis malsupren. Ekkrakis pafo, lia fusilo estis (sen premo de l' mano) ekpafinta. Unue mi staris tute rigida, kiam mi vidis la sinjoron malsupre kuŝi konvulsiante. Sed poste mi kolektis ĉiujn miajn fortojn kaj rapidis malsupreniri. Sed oni povis nenion plu fari. La kuglo estis penetranta en la kolon de sinjoro Birg. Unue mi staris dum daŭro de „Patro nia” ĉe li. Poste mi iris en la vilaĝon, kie mi telefonis al la ĝendarmaro. Dum la nokto mi forportis la mortinton.

Ne estas bone, se tia akcidento okazas al ĉasgardisto. La nova sinjoro venis en printempo kun alia ĉasisto. Li diris, ke li jam tre kutimiĝis al li kaj pro tio ne volas havi novan ĉasgardiston. Sed mi rimarkis, ke mi rememorigus lin tro multe pri la malfeliĉo de sinjoro Birg. Do mi serĉis alian laborlokon kaj estis poste ankaŭ kontenta pri la ŝanĝo. Sed mi tamen ne povas tute forgesi la vilaĝon Hörtelsbach; ĝi estis bonega ĉasdistrikto. Kaj ankaŭ pri sinjoro Birg mi ofte devis rememori, precipe pri tio, ke li antaŭsciis sian morton kaj pri lia rakonto de „nordlanda furiozo”. Mi devas ankaŭ pensi, kiamaniere okazis la sceno, kiam sinjoro Birg atakis per revolvero Tore-on.

Esperantigis laŭ konsento
de l' aŭtoro

Hans Tressel

MIA FERIO

Rememorante pri miaj lernejaraj jaroj mi pensas, ke ĉiujare, escepte la duan jaron, ni havis en la literatura fako la saman taskon: skribi konceptaĵon pri la somera ferio. La verkoj sub tiu ĉi titolo estis tre similaj unu al la alia, kaj vicigis la pli-malpli gravajn okazintaĵojn de la somero. La sorto de tiuj konceptaĵoj estis ankaŭ simila. La sekvantan horon la profesoro aŭ profesoro tralegis ilin aŭ ne, kaj poste ili estis forgesitaj. Post semajnoj, kiam lernanto elŝiras la lastan folion de la kajero, la unua ankaŭ elfalas. Tiam la studento legas la jenan, ĝenerale samforman tekston:

„La delonge atendita ferio alvenis, eĉ pasis. Dum la somero mi estis hejme, sed dum du semajnoj mi somerumis apud la lago Balaton. Mi laboris en la fabriko en kiu laboras ankaŭ mia patro. Fininte la tagan laboron mi ripozis kaj legis, sed kelkfoje mi prenis la pasintjarajn lernolibrojn por ne forgesi ĉion. (Estas rimarkinde, ke la lasta frazo ne estas tute vera.) Domaĝe, ke la ferio ne estis iom pli longa, sed dum tiuj du monatoj mi refreŝiĝis kaj nun, komence de la nova lernejararo, mi lernos pli fervore.”

Nun la lernanto konstatis, ke la kajero ne perdos el sia valoro se ĝi ne havos tiun folion, kaj malrapide, pripenseme disŝiris la paperon.

Nu, mi ne volas rakonti pri tia ferio, ĉar tiaj estas ja multe priskribitaj. Mi volas rakonti pri iu malnova somero. La rakontinto de la okazintaĵoj estas kemiisto ĉirkaŭ kvardekjara. Li havas maldensan helkoloran hararon, kaj en la helbluaj okuloj kaŝiĝadas gaja, juneca lumo. Fininte siajn rakontojn, ĉiam li notas, ke ĉi tiu estis ankaŭ leciono de la lernejo de la vivo.

Sed nun-ni aŭskultu la rakontanton.

La tempo, kiam mi ankoraŭ eluzis la benkojn de la gimnazio, ne estis tiel bela, kiel ŝajnas tra la ora nebulo de la pasinteco. Ni studentoj havis sironon, kies nomo estis Mono. Ĝi aperis kaj malaperis antaŭ ni, kantis dolĉe, vokadante nin el la lernejo. Ja estis multaj knaboj, kiuj interrompis sian lernadon. Ili pensis, ke estas pli bone lerni metion ol bataladi ankoraŭ dum kvin jaroj en la gimnazio kaj universitato sen mono, sen belaj vestaĵoj, sen baloj kaj amuzoj. Vere, estis treege malagrabla sidi kun dolĉa knabineto sur iu benko sub la praaj arboj de la Margaret-insulo kaj pensadi: „Ĉu mi havas sufiĉe da mono por aĉeti glaciaĵon por ŝi kaj iri hejmen per tramo?”

Tiuj estis la cirkonstancoj dum la lernejaraj. Kaj somere? Ni devis prizorgi laboron por gajni kelkajn helerojn, el kio ni povis aĉeti kelkajn vestaĵojn kaj librojn por la nova lernejararo.

Tiun someron sur la listo de necesajoj staris „dimaŭĉaj ŝuoj” la unua. Aliajn aĵojn mi ne bezonis, aŭ ne bezonis tro urĝe. Dum la antaŭa somero mi ricevis vestaĵojn kaj „semajnajn ŝuojn”, kaj antaŭ du jaroj mi ricevis surtuton kaj kelkajn malgrandajn.

Tiun someron mi laboris en kontoro, sed kie, mi jam ne scias.

La tempo pasis tre rapide, ĉar mi atendegis la salajrotaĵojn. Ne nur mi atendis ilin, sed mia panjo ankaŭ, ĉar... Nu, kial sekreti? Ni bezonis la monon. Ni bezonis tiujn kelkajn mizerajn helerojn, kiujn oni pagis al la studentoj, kiuj somere faris la amason da laboro, kiun multaj inertaj oficistoj ne prizorgis dum monatoj. Ni bezonis la monon por pano, por terpomoj, graso kaj, malofte, por viando aŭ frukto.

Mia panjo ricevante la monon ĉiam diradis:

— Ne malĝoju, mia fileto. Ni acetos la ŝuojn per la sekvanta salajro.

Kaj zorgeme skribis la sumon en sian kajeron. Ho, mia dolĉa panjo! Mi ja sciis, ke vane!

Pasis la somero. Sur la ĉielo naĝis blankaj ĉifonnujoj, malvarmeta vento hirtigis la polvokovritajn foliojn, kaj nokte kelkaj malfruaj steloj subiĝis de la nigra ĉielo.

Poste eksonis la sonorilo unuafoje en la nova lernejararo. Jarkomenca festeno. Ĉiuj kunlernantoj aperis en nova vestaĵo, novaj ŝuoj...

Tiu paro da ŝuoj, kiun mi destinis... Ho, tiuj estis belegaj ŝuoj! Ili estis faritaj el brila, bruna ledo. La plandoj estis kudritaj per dika flava fadeno kaj ili tute ne havis laĉojn. Kiel ajn nekredible, ili ne havis laĉojn. Anstataŭ laĉoj ili havis bukojn. Jes, ili estis tre bonaspektaj. Ili ridetis ankoraŭ kristnaske de malantaŭ la montra fenestro al la preterirantoj.

La „riĉaj knaboj”, kies vestaĵoj estis tute novaj, rakontis pri la du semajnoj pasigitaj ĉe Lillafired. Ili diris, ke tiuj du semajnoj estis pli valoraj por ili, ol la tri, kiujn ili pasigis apud Balaton. Mi nur aŭskultadis iliajn aventurojn.

— Nu, kaj vi, hometo, kie vj somerumis? — demandis iu de mi.

— Ho mi? Mi estis ĉi tie, en Budapeŝt. Ĝenerale mi ne tro ŝatas vojaĝadi...

— Hm. Jes? — li turnis sian dorson al mi.

Venis la vico de grizaj labortagoj. Mi lernis fervorege por scii pli multon ol ili. La veran scion oni povas nek aĉeti nek forpreni. Por tio oni devas penadi!

Iun tagon diris panjo:

— Venu, fileto. Ni iras aĉeti ŝuojn.

Ni haltis antaŭ la montra fenestro de la ŝuvendejo. Tiuj bukaj ŝuoj tie ridetis ankoraŭ malantaŭ la vitro.

— Tie ili estas. — mi diris.

— Tiuj bukhavaĵoj?

— Jes.

— Ili ne plaĉas al mi. Sed rigardu la aliajn. Ili estas pli delikataj kaj pli malmultekostaj.

Mi rigardis la aliajn, poste ekrigardis ankaŭ la destinitajn kaj tiam mi vidis jam, ke la aliaj estas pli delikataj, ol la bukhavaĵoj...

Kiam ni iris hejmen kun la ŝuoj, panjo demandis:

— Ĉu vi koleretas, ĉar ni aĉetis tiun ĉi paron?

Kaj mi respondis sincerege el mia koro.

— Ne, mia panjo. Eĉ mi tre ĝojas pro tio.

Ne, mi tute ne koleretis, mia dolĉa patrino! Mi ĝojis pro la ŝuoj, kaj ĝojis, ke mi lernis novan lecionon de la lernejo de la vivo...

Nun la rakontanto eksilentis. Sur lia vizaĝo estis pala, amplena rideto.

Ho, jes! Preskaŭ mi forgesis. Ĝis nun mi ne diris eĉ unu vorton pri mia propra ferio.

Mia ferio... Kiel komenci? Eble tiel:

La delonge atendita ferio alvenis, eĉ pasis. Dum la somero mi estis hejme, sed dum du semajnoj mi somerumis apud la lago Balaton. Mi laboris en la fabriko en kiu laboras ankaŭ mia patro. Fininte la tagan laboron mi ripozis kaj legis, sed kelkfoje mi prenis la pasintjarajn lernolibrojn por ne forgesi ĉion. Domaĝe, ke la ferio ne estis iom pli longa, sed dum tiuj du monatoj mi refreŝiĝis kaj nun, komence de la nova lernejararo mi lernos pli fervore...

Partoprenu en la

KAMPANJO DE LA JARO!

Mendu jam hodiaŭ
libreton de atestiloj

por

APOGANTOJ DE U.E.A.!

• **Esperantistoj kunlaboris al japana ĵurnalo „Yomiuri“**, unu el la plej grandaj ĵurnaloj en Japanujo, volis starigi rubrikon „De geamikoj en la mondo“, kiel speciala kompilajo por la novajaroj tagoj en 1957. La ĵurnalistoj s-roj Huru-zawa K., neesperantisto, kiu iniciatis la projekton, petis kunlaboron de s-roj Okumura R. kaj Mijamoto M., kaj f-ino Kita S. Oni sendis petleteron al elektitaj samideanoj. Malgraŭ la urĝeco de la tempo la kontribuoj alvenis ĝustatempe, kaj de la 15a de januaro ĝis la 21a de februaro aperis ĉiutage po 1 artikolo. Estis ricevitaj sume kontribuajoj el 25 landoj, kaj kontribuis P. Balkanyi el Hungarujo, F. Szilagyi el Svedujo, W. Auld el Skotlando, B. Rudolf el Ĉeĥoslovakio, N. Kavenius el Finnlando, k.a. La projekto havis grandan eĥon inter la legantaro.

• **Nova filmo kun Esperanta parolo.** La novzelandaj registaro, kies adreso estas: Dept. of Tourist and Publicity, P.O. Box 5042, Wellington, Novzelando, ĵus pretigis 16 m.m. filmon pri Novzelando kun Esperanto-parolado. La filmo daŭras dum proksimume 15 minutoj, kaj ĝi estas blanka kaj nigra (ne kolorigita). La Esperanta parolo vere estas rekomendinda, kaj ni esperas ke tiu ĉi filmo estas vidota en ĉiuj transmaraj landoj. Kopioj estas prunteblaj de unu el la sekvantaj adresoj:

The Official Secretary, Office of the High Commissioner for N.Z., 415 Strand, London, Anglujo; The First Secretary, Office of the High Commissioner for New Zealand, 105 Wurtemberg Street, Ottawa, Kanado; The Tourist Commissioner for N.Z., N.Z. Government Offices, D.O.E. Building, 153 Kearny Str., San Francisco, U.S.A.; The Counsellor, N.Z. Embassy, 19 Observatory Circle, Washington, D.C., Usono; The Minister, N.Z. Legation, No. 26 Sanbancho, Kojimachi, Chiyoda-Ku, Tokio, Japanujo; The Minister, N.Z. Legation, 9, rue Leonard De Vinci, Paris XVI, Francujo; The First Secretary, Office of the High Commissioner for N. Zealand, Canberra, A.C.T., Aŭstralio.

• **La eŭropa lingvo-problemo.** Ĵus aperis kvarlingva flugfolio „Naŭ tezoj pri la eŭropa lingvo-problemo“, en lingvoj angla, franca, germana kaj esperanta. Tiu ĉi flugfolio, verkita de nia estrarano D-ro Hermann, estas alte rekomendinda en la servo de Esperanto, kaj estas havebla ĉe d-ro Hermann, Lampertheim/Hessen, Germanujo. Prezo: 5 ekzempleroj kontraŭ 1 resp. kup.

• **Esperanto-Instituto de Piaui (Instituto Piauiense de Esperanto).** La 9an de marto 1957 niaj samideanoj fondis en Teresina, Ŝtato Piaui, Brazilo, Instituton de Esperanto. La nova instituto naskiĝis en radio-stacio, nome **Rádio Difusora de Teresina**, kie kunvenis la samideanoj kaj invititaj kleruloj, katolikaj pastroj, protestantoj, spiritistoj, k.a., por fondi la



La 21-an de januaro 1957 komenciĝis E-kurso en Luther-lernejo. Konrektorino Karl Vosseler instigis siajn gelnantojn de la 8-a klaso lerni E. antaŭ ol forlasi la lernejon (je Pasko) kaj disponigis tiucele sian klas-ĉambron dum libera posttagmezo.

La 22-an de januaro komenciĝis E-kurso ankaŭ en Lammerberg-popollernejo laŭ instigo de ĝia rektoro Karl Wissmann, kiu same disponigis sian klas-ĉambron de la 8-a klaso kaj akcentis, ke Esperanto certe estos la sola fremda lingvo, per kiu la gelnantoj venonte povos interkompreniĝi kun eksterlandanoj.

Partoprenas ambaŭ kursojn 20 gelnantoj, kiujn senpage gvidas inĝeniero Volde-marro von der Ley.

Bonvolu subteni tiun komencon per salutkartoj kaj dankesprimoj al ambaŭ rektoroj. Jen la adresoj:

1. Rektoro Karl Wissmann, Lammerberg-popollernejo, TAILFINGEN/Württ., Germanujo.
2. Konrektorino Karl Vosseler, Luther-lernejo, TAILFINGEN/Württ., Germanujo.
3. Komencantoj skribu al „8-a klaso, Ilse Woerz, Lammerberg-lernejo, TAILFINGEN/Württ., Germanujo.

La bildo montras la 1-an kurshoron en Lammerberg-lernejo. Malantaŭe, rektoro Karl Wissmann (dekstre), apude V. von der Ley (kursestro).

Instituton, kies adreso estas Rua Humberto de Campos, 895, Teresina, Piaui, Brazilo.

• **Somera Esperanto-Hejmo.** La 15an de decembro 1956 oni solene inaŭguris en Joao Pessoa, ĉefurbo de ŝtato Paraíba, Brazilo, grandan konstruaĵon por ripozejo kaj promenejo de esperantistoj. Por la solena inaŭguro oni invitis dekojn da eminentuloj, rektoroj, profesoroj, politikistoj kaj esperantistoj. La konstruaĵo estas ĉe strando Tombau, agrabla promenejo, kaj havas la nomon Somera Esperanto-Hejmo.

• **Esperanto ĉe Ila Gimnastikado en Zagreb.** De la 10a ĝis al 14a de julio ĉi-jare okazos en Jugoslavio grandega manifestacio, la Ila Gimnastikado en Zagreb. Oni atendas 15000 sportulojn de multaj diversaj landoj al granda kunveno de gimnastiko kaj sporto. Jugoslavio elspezas grandan sumon por sukcesigi la aranĝojn, ekskursojn kaj ekspoziciojn. Esperanto estas aprobita inter 4 aliaj ĉeflingvoj kiel koresponda lingvo de la preparkomitato en Zagreb.

• **Esperanto en enciklopedioj.** En Jugoslavio aperas novspeca enciklopedio, en kies 2a volumo de la Ĝenerala Fako aperis jenaj glosoj: Cseh, Andreo; Chavet, Gabriel; Esperantisto, La; Esperanto. Laŭ la alfabeto aperos pluaj glosoj pri esperantismo kaj famaj esperantistoj, en sekvantaj volumoj. En la 7a volumo de la nova granda „Enciklopedio de la stu-

dento“ (naŭvoluma), eldonita de la granda itala firmao Ullman & Co. (Milano), aperis 5-paĝa artikolo pri Esperanto, verkita de D-ro Inĝ. Giordano Azzi. Pli ol dekmil ekzempleroj de la enciklopedio estas jam venditaj.

• **Novaj kursoj en Italujo.** Post prelego de Prof. Giorgio Canuto en Aosta, kaj de Prof. Corrado Grazzini en Montevarchi, malfermiĝis novaj kursoj. Samtempe komenciĝis kursoj en Bari, Bologna, Bolzano, Borgo Buggiano, Cagliari, Carrara, Cittadella, Citta di Castello, Como, Callarate, Genova, Laveno, Livorno, Mantova, Massa, Messina, Milano, Padova, Palermo, Pisa, Pistoia, Reggio Emilia, Roma, Sansepolcro, Sciacca, Torino, Trieste, Udine, Varese, Verona. En Livorno komenciĝis kurso ĉe la „Legione Carabinieri“.

• **Traduko el Esperanto.** En „Verstandig Ouderschap“ (Nederlando) de aprilo 1957, aperis nederlanda traduko de la novelo de Marjorie Boulton „Lernantino“, kiu aperis en „Esperanto“, novembro 1956. La tradukinto estis Rob. Vetter.

• **Esperanto en la gazetaro.** La silesia socia, kultura kaj literatura semajna revuo „Przemiany“ dediĉis pli ol duonon de grandformata paĝo al artikolo de Marian Niewiarowski pri la Esperantomovado, precipe pri UEA. Interalie oni utiligis la portreton de Zamenhof, kiu aperis sur la aprila (1956) numero de

„Esperanto”. Simile malavaran spacon dediĉis „Kensington Post” (Londono) al intervjuo pri Esperanto kun s-ro Leslie, Sekretario de B.E.A. En „The Kensington News” aperis intervjuo kun s-ro Bertram Potts, Novzelando, kiu ĵus faris per esperantan vojaĝon tra Eŭropo. „Il Tirreno” (Livorno, Italujo) raportis favore pri la malfermo de „Esperanta Printempa Kampanjo”. En „La Dépêche” (Francujo) aperis longa artikolo pri prelego de nia estrarano s-ro Llech-Walter, kaj „República” (Lisbono, Portugalujo) daŭrigis sian regulan aperigon de rubriko „Cronica Esperantista” de Saldanha Carreira. La brazila framasona revuo „Cadernos de Cultura” publikigis interesan studon de s-ro Ismael Gomes Braga pri la Estonteco de la Homaro kaj Framasonio, en kiu aperas kun multaj komentarioj la Rezolucio de UNESKO pri Esperanto.

● **Unua Esperanto-grupo en Hindujo.** Dank' al la senlaca kaj efika klopodado de s-ro Tibor Sekelj kiel UEA-representanto dum ties fruktodona misio tra Azio, ni ĝoje anoncas la freŝan naskiĝon de la unua Esperanto-grupo en Hindujo. Je la 5an de aprilo, estis fondita la ESPERANTO-SOCIETO DE BOMBAY laŭ la iniciato de nia agema amiko, kiu tuj komencis elementan kurson. Ĉe tiu memorinda kunveno partoprenis dekkvin personoj; el ili tri jam konas Esperanton. Estis elektita estraro, kiun prezidas D-ro R. Megde, hinda kuracisto; funkcias kiel sekretario Rev. Anuruddha, Prezidanto de La Budhana Ligo Esperantista. La Societo ĉiusemajne kunsidas en la biblioteko de la Kongrespartia Domo, afable kaj senkoste metita je ĝia dispono de la urbaj instancoj. De post la foriro de S-ro T. Sekelj por Ĉinujo, la kurson daŭrigas D-ro Megde

kaj Rev. Anuruddha, kiuj projektas eldoni sian propran revuon.

Kun granda plezuro ni kore salutas tiun atentindan okazaĵon, kiu signas novan kaj gravan paŝon en la disvastigado de nia lingvo. Ni povas konjekti, ke la ESPERANTO-SOCIETO DE BOMBAY nun estas la kerno de la estonta Hinda Esperanto-Asocio, kaj ni sincere gratulas niajn eminentajn samideanojn por ilia sukceso. Por ilin helpi en ilia laborado, ni petas de niaj legantoj amase sendi salutleterojn, propagandilojn, gazetojn, kaj ankaŭ lernolibrojn (anglajn) kaj literaturaĵojn al la jena adreso: Rev. Anuruddha, Bhikku-in-charge, „Anand Vihara”, Nair Hospital Compound, Lamington Road, BOMBAY 8, Hindujo.

Dankon al ĉiuj.


● **Caratinga Esperanto-Grupo** (Caixa postal, 230, Caratinga MG, Brazilo) estas unu el la plej novaj Esperanto-organizaĵoj en Brazilo, sed unu el la plej aktivaj. Antaŭ kelkaj jaroj estis neniu esperantisto en tiu urbo, sed artikoloj pri Esperanto en Rotariaj revuoj vekis la scivolemon de la Prezidanto kaj Sekretario de la tiea Rotaria Klubo, kiuj mendis librojn kaj eklernis la lingvon. Kvankam sen instruisto ili rapide lernis la lingvon kaj varbis amikojn por la movado. Rotary Club donis al ili sian sidejon. Ili abonas 18 revuojn, posedas riĉan bibliotekon, diskojn, kolektojn da poŝtkartoj k.a. Ili aranĝis grandan, belan ekspozicion de esperantaj el ĉiuj landoj. Ili interŝanĝas objektojn kun ĉiuj popoloj tra la poŝto: sendas saketojn da kafo de sia regiono kaj ricevas vodkon, likvorojn, porcelanaĵojn k.a. Nun jam estas preskaŭ 100 esperantistoj en la urbo kaj U.E.A. tie havas D., VD kaj du FD.

Baldaŭ ili aranĝos duan ekspozicion por kiu ili jam posedas 2.000 novajn


esperantajojn, kiuj ne aperis en la unua. En 1958 tie efektiviĝos la tria ŝtata Esperanto-Kongreso de Minas Gerais. Ĉie Esperanto vekas intereson!

● **Fotoj pri esperantaj okazaĵoj.** Komisiite de Centro de Esploroj kaj Dokumentado, Vilho Setälä, komitatano de UEA, preparos filmstrion informan, por la uzo de prelegistoj de ĉiuj landoj. La enhavo koncernos la esperantan movadon en ĉiuj formoj, antaŭ ĉio tion, kio estas plej reprezenta. Por ke estu uzebla plej kompleta materialo por elekto de la plej efika ni instigas ĉiujn esperantistojn, kiuj posedas fotojn pri la universalaj kongresoj (kongresanaro kaj eminentaj personoj), someraj universitatoj, belartaj konkursoj, kulturaj domoj, kursoj, ekskursoj, teatraĵoj, kunvenoj de la junularo, fakaj kunvenoj, ktp., sendi tiujn fotojn prunte por eventuala kopiado. Sendu ĉion bone pakite, kun aparta notslipo pri ĉiu bildo, fiksita sur la dorsa flanko, en nefermita sendaĵo, afrankita laŭ presajtarifo. Ĉiu sendaĵo estos dece kompensata, resendata zorge pakita por eviti domaĝojn. La bildoj estu tehniko bonaj kaj bone komponitaj! La adreso: S-ro Vilho Setälä, Esperanto-vojo 4, Matinkylä, Finnlando.

● **„Pollando” aperas regule en Esperanto.** Multaj el niaj legantoj jam legis aŭ vidis belan ilustritan revuon „Pollando”, kiu dufoje aperis en la lingvo Esperanto. „Pollando”, kun variaj artikoloj pri diversaj kulturaj temoj, kun multkoloraj bildoj kaj ilustraĵoj, regule aperas en la lingvoj angla, franca, germana, hispana, pola kaj rusa. Dum 1957 ĝi aperas regule ankaŭ en Esperanto. Kompreneble ĝia sukceso dependas de la subteno de la esperantistoj! Abonpago por la tuta jaro estas 3 dolaroj aŭ egalvaloro. Abonebla ĉe UEA.



Kion mi devas toleri! Vi ĉikanas, ke mi hodiaŭ ne trinkis la termoson da kafo, kiun vi provizis por mi, kaj nun ia kretena fuŝisto presigas mian nomon en la nekrologa rubriko!



„Ĉu jam komenciĝas la problemoj?”



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:
Nicola Minnaja,
Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

13-a INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kaj urbo Villeneuve-lez-Avignon vin invitas tutkore al la 13-a Internacia Junular-Kunveno, kiu okazos sude de Francujo en la urbo Villeneuve-lez-Avignon de la 27-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1957-a.

Honora Prezidanto: S-ro Soulier, urbestro de Villeneuve-lez-Avignon.

Loka Kongresa Komitato: S-ro Roger Motto, Rond Point de la Gare, Avignon (Vaucluse).

S-ro Laurent, Urba Konsilanto, „Les Cigales”, Villeneuve-lez-Avignon (Gard)
F-ino Marie Bonnafous, 6 rue de la Monnaie, Villeneuve-lez-Avignon.

S-ino Marie Blary, 9 rue Jean-Jaurès, Arles (Bouches-du-Rhône).

Provizora programo.

Kongresejo: La Festa Salono de la urbdomo, Villeneuve-lez-Avignon.

Loĝado: La kongresanoj loĝos en lernejo (maksimume 200 personoj) kaj en religia seminariejo (en Avignon).

Pensio: La kongresanoj manĝos komune en la lernejo, en la religia seminariejo kaj en restoracioj.

Provizora tagordo.

Sabato 27: Akcepto en la stacidomo de Avignon kaj en la urbdomo de Villeneuve. Diservo.

Dimanĉo 28: Diservo. Vizito al la urbeto Villeneuve. Vespere: Folkloro Grupo.

Lundon 29: Tuttaga ekskurso al Pont du Gard, Uzès, Nîmes (vizito al la Roma amfiteatro kaj al la urbo).

Mardon 30: Laborkunsidoj. Eventuale: Muzika kaj Arta Vespere.

Merkredon 31: Vizito al la historia urbo Avignon (Kastelo de la papoj, muzeo, vidindaĵoj).

Ĵaŭdon 1: Tuttaga ekskurso tra Rodano valo kaj regiono: Orange (roma teatro), Aven d'Ornac (subteraj grotoj), Fontaine de Vaucluse (fama fonto).

Vendredon 2: Fino de laborkunsidoj. Dancvespero subĉiela kun partopreno de la loĝantaro.

Sabato 3: Foriro per vagonaro al Marseille.

Krome okazos Oratora Konkurso laŭ diskonigota temo kaj Eŭropa Vespere.

Utila Kontakto: En Avignon okazos samtempe Festivalo de la Amikoj de la Popol-Teatro, kun prezentadoj, kaj ĉiutagaĵaj debatoj en la Papa Palaco, al kiuj la kongresanoj estas invititaj. Estas ankaŭ antaŭvidebla vizito de partoprenantoj en tiu Festivalo al la esperantistoj en Villeneuve.

Kotizo.

Inkluzive loĝadon, manĝojn, ekskursojn, enirkostojn dum vizitoj, enirprezon por la teatraĵ vesperoj en Avignon kaj transportadojn tra la urbo:

- A. Loĝado en komuna dormejo; komunaj manĝoj (maksimume 100 personoj) Fr.fr. 8500
- B. Loĝado en komuna dormejo, manĝoj en restoracioj (maksimume 150 personoj) Fr.fr. 9500
- C. Loĝado en religia seminariejo (unulitaj ĉambroj) rekomendita por knabinoj; pensio en la seminariejo (maksimume 60 personoj) ... Fr.fr. 9500
- D. Loĝado en hotelo kaj privata ĉambro (limita) Fr.fr. 13000

Ne TEJO-anoj kaj ne aliĝintaj kongresanoj en la 42-a Universala Kongreso de Esperanto en Marseille pagos 1000 fr.fr. pli.

Pagoj.

Oni devas pagi je la aliĝo antaŭpagon de la kongreskotizo de fr.fr. 2000.

Aliĝojn kaj pagojn oni sendu al:

S-ro Roger Motto, Rond Point de la Gare, Avignon (Vaucluse). Poŝtĉekkonto: Roger Motto, Marseille 1290-86.

Pagojn akceptas ankaŭ la 42-a Universala Kongreso de Esperanto. Banko: James Rosa, Marseille. Poŝtĉekkonto: Groupe Espérantiste N. 156-15.

L. K. K.

POR LA PARTOPRENANTOJ EN LA 6-a JUNULARA FESTIVALO

Bulgara Esperantista Prepara Festival-Komitato eldonas bultenon „Esperanto-Festivalo”. Por la esperantistoj kiuj intencas veturi al Moskvo, ĝi estas tre valora ligilo. Oni povas ĝin ricevi skribante al Bulgara Esperantista Prepara Festival-Komitato, kaj sendante por helpi ĝian eldonadon esperantaĵojn: librojn, kantarojn, glumarkojn, insignojn, gramofondiskojn ktp. aŭ irk. egalvalorajn al 1 usona dolaro.

MANIFESTACIO EN HUNGARUJO

La 19-an de aŭgusto okazos en Budapeŝt Hungarlanda Junulara Esperanto-Konferenco. Salutojn oni sendu al Junulara Esperanto-Grupo, Budapeŝt, V. ker, Engels-tér., Hungarujo.

INTERNACIA STUDENTA KURSO „HOMO KAJ MAŜINO”

La Studenta Unuiĝo de Lund (Svedujo) kaj la Rotariaj Klubo de suda Svedujo dum kelkaj jaroj aranĝis internacian kurson (anglalingve). Ankaŭ en septembro (de la 2-a ĝis la 14-a) 1957 ili havos similan kurson. Oni estas tre severa, kiam oni elektas la partoprenantojn, kiuj se eble havu ian akademian ekzamenon. Ĝis nun mi ne vidis esperantiston inter la partoprenantoj; estas dezirinde, ke ankaŭ ili venu. Tiuj esperantistoj, kiuj venos, devas esti tre diplomataj sed tamen kuraĝaj pioniroj por nia movado inter la studentoj kaj akademianoj kaj rotarianoj. Esperantistoj povos sin turni al la prezidanto de la studenta esperanta asocio Fil. mag. Per Edler, Ö. Vallgatan 47, Lund, Svedujo. Sed la oficiala adreso ja estas Fil. mag. Thord Palmlund, Tomegapsgatan 15, Lund, kiu estas instruisto en la angla lingvo kaj mondfederalisto sed ne esperantisto.

OLLE OLSSON

La celo de la Internacia Studenta Kurso „Homo kaj maŝino” estas diskuto de la ĉefaj tendencoj de la teknika progreso kaj de ĝiaj sekvoj por la socio, precipe de la efiko de aŭtomatigo kaj paca uzo de atomenergio. Ĝi ankaŭ celas doni kiel eble plej multajn informojn pri Svedujo. Ĝia ĉefa celo estas, probable, starigi Lund kiel renkontlokon por studentoj de diversaj nacioj kaj kun malsamaj politikaj konvinkoj.

Kursa kotizo: 225 sv.kr. (proks. 16 pundoj), inkluzive ĉiujn lekciojn, ekskursojn, komunajn aktivecojn, manĝojn kaj loĝadon.

Stipendioj: 40 stipendioj estas je dispono de fremdaj studentoj laŭ merito. Ili inkluzivas la tutan kursan kotizon.

Aliĝo: Petoj por aliĝo kaj stipendioj estu sendataj al Internationella Kursen, Fil. mag. Thord Palmlund, Tomegapsgatan 15, Lund, Svedujo. La demandoj alvenu al Lund kiel eble plej frue, ĉiukaze antaŭ la 1-a de julio. Bonvolu doni kompletan liston de akademiaj titoloj.

Lingvo de la kurso; angla.

(el la programo de la Kurso)

ALVOKO AL AMIKOJ DE LA EŬROPA MOVADO

En Marienberg (Germanujo) ekzistas Eŭropdomo, kiu vokas jam ek de kelkaj jaroj la junularon tutmondan, precipe el Eŭropo. Marienberg situas en la bellega mezmontaro Vestervaldo inter Frankfurt apud Majno kaj Kolonjo apud Rejno.

Jen la plej gravaj aranĝoj:

22-a Eŭropa seminario por lernantoj. (20-6 ĝis 29-6-57) „Eŭropo survoje al integriĝo”.

Internacia studkunsido. (13-7 ĝis 22-7-57) „La Eŭropa kulturo en la pruvo”. Eŭropaj renkontiĝoj. (25-7 ĝis 7-9-57). 1-a dekada. (25-7 ĝis 3-8-57) Temo:

Traktado de kulturaj demandoj.

2-a dekadado. (7-8- ĝis 16-8-57) Temo: kiel la unua.

3-a dekadado. (19-8 ĝis 28-8-57) Temo: La politika respondeco de la junularo.

4-a dekadado. (29-8 ĝis 7-9-57) Temo: kiel la tria.

Cu ni, la Esperantojunularo, ne interesiĝas pri la Eŭropa movado? Mi opinias, ke ni devos aktiviĝi; ankaŭ nia vorto estas aŭdenda!

Tial la Esperanto-junularo de Vestervaldo invitas vin, geamikoj, Venu multnombre! La prezo malalta de 20 ĝis 30 g.m. inkluzivas ĉion: partoprenon, loĝadon kaj manĝadon por tuta dekadado. Pluajn detalojn bonvolu postuli (bv. ald. resp. kup.) de:

KARL-ERNST SALZMANN,
(22b) Horresen/Montabaur
(Germanujo)

LOGIKO

LOGIKO

En la februara numero de „British Esperantist“, organo de Brita Esperan-

tista Asocio, aperis artikolo en angla lingvo, kies ĉefpunktojn ni prezentas en traduko:

„La faktoj estas simple nomeblaj, ili estas:

1-e: La anaro de Brita Esperanto-Asocio deponas la milito konstante malpliĝis, escepte dum la lastpasinta jaro, kiam ĝi restis proksimume la sama;

2-e: La meznombra aĝo de la anoj estas inter 50 kaj 60 jaroj.

La konkludo el tiuj du faktoj ne bezonas substrekon. Estas evidente ke, se ne okazos iu drasta faro por renversi tiun direkton dum malmultaj venontaj jaroj, Brita Esperantista Asocio, kiel ni nun konas ĝin kun Centra Oficejo kaj kun salajrata okupata sekretario, ĉesos ekzisti!”

Respondante al propono de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, Brita Esperantista Asocio rifuzis fondi junularan sektion. Sen komentario.

GIAN CARLO FIGHIERA,
estraro de TEJO

EŬROPA JUNULARA TENDARO

Gejunuloj, la kultura sekcio de la Rondo de la Naĝantoj en Marmande (Lot et Garonne - Francujo) organizos de la 1-a de julio ĝis la 31-a de aŭgusto 1957-a tendaron de junaj Eŭropanoj.

Celo: Interfratigi la junularon de dek kvar landoj najbaraj de Francujo.

Rimedoj: Sportoj (speciale naĝado), praktiko de lingvoj, diskoj, muziko, folkloraj manifestacioj, malaltprezaj ekskursoj al Lourdes, Pireneoj, Biarritz, Arcachon ktp.

Kondiĉoj: Gejunuloj de 16 ĝis 25-jaraj; dato kaj daŭro laŭ bonvolo de la partoprenanto; membrokarto kun akcidenta-sekuro, prezo 500 fr. fr.; nutrado potaga: 250-400 fr. fr.; se eble, kunporti tendon, se ne, senpaga loĝigado.

Enskribiĝu skribante al s-ro Varailon, Stacidomo, Marmande, Francujo, aldona neuzitajn vialandajn poŝtmarkojn por la respondo.

A. RIBOT

Niaj Konkursoj

Artkonkurso N-ro 1

En tiu ĉi numero, sur p. 99, vi trovos la rakonton „Mia Ferio“. Ni proponas libropremion por la plej bona ilustraĵo por tiu rakonto. Limdato: la 30a de julio.

John Milton

Raporto pri Literatura Vetludo N-ro 2

Verku alvokon (prozan aŭ versan) al iu ajn lando aŭ teritorio, kie nia lingvo estas ankoraŭ nemulte konata (Hindujo, Afriko, Ĉinujo, Grenlando, Pacifiko ktp), rekomendante Esperanton... La alvokon oni povas adresi ankaŭ al iu gvidanto de la koncerna lando.

Oni malmulte entuziasmis pri ĉi tiu konkurso: entute venis nur ses provoj. Eble mi donis impreson, ke mi deziras ion nepre seriozan, peze farĉitan per propagandaj faktoj, ĉar krom tiu de Poul Thorsen, kiun pufigis ioma gisto de bonhumoro, ĉiuj havis seriozan temon. Efektive, mi esperis, ke la temo inspiros diverse la kontribuantojn, ankaŭ do por bonhumoro, sprito, blago.

La ses alvenintaj provoj konsistis el kvar versformaj kaj du prozaj. Bertil Englund faris sobran prozan alvokon, sed tute ĝeneralan, al neniu lando direktitan. B. C. Sliggers liveris tre persvadan prozan alvokon al la loĝantoj de Pacifiko. El la kvar versaĵoj du venis de aŭtoroj, kiuj ankoraŭ ne venkis la Esperantan gramatikon (ili restu indulge sennomaj), la kvina de Poul Thorsen, havis iom neatenditan karakteron: ĝi estis helpokrio el „subevoluinta Blinkenbergio“ sed ankaŭ, ŝajne, al la samideanoj de la sama lando, supozeble do ĝi validas je la postuloj. Ĝi estas lerta, kaj ĉe partopreno pli multnombra ĝi

kredeble atingus meritan lokon. Tamen, pro la malgranda nombro de konkursintoj mi ĉifoje rekomendas nur unu premion, nome al Peter Beiswanger, pro lia alvoko al la Japana popolo, kiun ni presigas. Amiko Beiswanger bonvolu konigi al la redakcio la formon de sia premio (libro elektota je valoro de 10 guldenoj).

VI. JUNA NACIO!

Fide la ponton vi serĉas al kler'
okcidenta

Kaj pri estont' de l' homaro admonas,
Serĉas al paca tutmond' per la kor'
antaŭsenta.

Kion ni vane delonge proponas.

Simbolo por ordo, kompreno, sindono
ŝajnas al ni Esperanto,

Vi, juna nacio kun kor' de leono
estu por ni batalanto!

Lingvo ŝariĝu por nova ide' fundamento,
Donu por rea naskiĝo simbolon;
Lingvon neŭtralan nacioj en firma

Uzu por havi la saman parolon.
konsento

Vi malesperu je nuraj promesoj;
ĉe ni la espero renovas.

Jen la estonto — en niaj kongresoj
la pacan komprenon vi trovas.

Flua, belsona, en amo kreita helpeme,
Ĝi dediĉita prediki toleron

Vivas organe, kreskadas kaj floras
poeme,

Estas instiga por semi esperon.

Simbolo por ordo, kompreno, sindono...

Noto: Kompreninte, ke lia poemo superas la difinitan limon, S-ro Beiswanger petis nin fortondi la troan parton. Pedantuloj povas do amputi la lastan strofon: mi mem ne volas esti tro rigora, kaj presigas la tuton.

J. Varty

La Lingva Flaoso

Ĉe la landlimo germana-dana alvenis aŭtoĉaro kiu kondukis francojn al SAT-Kongreso en Aarhus. Kunvojaĝis angla esperantisto. La doganisto nepre bezonis paroli al la franca ŝoforo. Sed ne simpla estis la afero.

La doganisto sciis la germanan, la anglo Esperanton kaj la germanan, franca esperantistino parolis Esperanton kaj la ŝoforo nur la francan.

Do: la ŝoforo parolis france al la francino; ŝi en Esperanto al la anglo. Tiu germane al la doganisto. Komprenoble, inversa estis la vojo, kiam la doganisto demandis la soforon.

L. L.

★

Nilo Ferlin (1898)

Feliĉo kaj Amo

Feliĉo vidis Amon en somermeza tag',
kaj Amo diris jene: Fratino,

vi estas la pli bela kaj pli forta por aj',
do helpu nian fratron el la timo.

Feliĉo ekridegis;

nun vidis ni kun mir',

kiel malmulte ŝi komprenis

de la ideo kaj sopir',

kaj de ĉio, kio iras sola, plorante.

El la oveda: Magda Carlsson

★

Novaj Libroj

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.
*) ricevebla ĉe U.E.A.

EDELVEJSO*, originala poemaro de Nisimura-Masao. Eldonis Japana Esperanta Librokoperativo, Osaka, Japanujo. 1956, 197 p. krom komentario. 12.5x18.5. Prezo: 19 steloj.

En majo 1940 la japana Esperanto-poeto Nisimura-Masao finis sian mallongan, suferoplenan sed belan vivon. Dekses jarojn post lia morto lia vidvino, Nisimura-Satiko, sukcesas eldonigi lian postlasitan parnason EDELVEJSO. Kaj kiam ni informiĝas, ke iam E. Lanti gratulis lin per „fantaziriĉa talenta poeto“, ni nepre ekhavas intereson pri tiuj elforaj poemoj de nia forpasinta japana samideano.

Estas iom malfacila tasko juste taksii verkojn ĝermintajn en fremda kulturo. Mi supozas, ke ofte niaj japanaj kaj ĉinaj samideanoj estas konfuzataj de la ellaboraj de niaj eŭropaj verkistoj. Same mi devas konfesi, ke mi legis la iom esoteran *Edelvejso* kun kelka hezito. Se mi koncizigu la postlegan impreson, ĝi estas tiu de trosatiĝo de rimoj kaj certa kaŝiĝeco de ideoj pro orgia verbozo. Dubindaj kaj foje eraraj vortuzoj ankaŭ difektas la ĝeneralan bildon. Nesufiĉa interpunkciado multloke malhelpas tujan komprenon, kie la strange miksitaj vortordo donas al la Esperantoteksto malklaran aspekton. Sed tamen, malgraŭ misoj kaj multaj lamoj, tiuj trovestitaj poemoj ofte elvokas la mistikan senton de vera poezio. La islanda Nobelpremiito Halldór Kiljan Laxness ie diras: „Se mi vidas honestan homon esti prezentata en poemo, tiam estas al mi egale, ĉu la poemo estas senlogika aŭ mallerte farita“. Per tio mi ne volas diri, ke la poemoj de Nisimura-Masao meritas tiajn epitetojn, tute kontraŭe multaj el liaj poemoj estas interesaj laŭ strukturo kaj bildriĉo. Sed kio estas plej grava kaj donas la laŭron al nia poeto, estas lia sincero, lia animforto, lia kuraĝo inspirita de supermorta amo, kiu batalas la krudan sorton de malsanulo:

*Sunbano! Sunbano!
kiel jen ĉampano
ŝaŭmas densa nub',
tostu ni, edzino,
glason da bonvino
pro l' saniĝ, sen dub'.*

(Sunbano p. 123).

Nur la veraj poetoj uzas poeziajn talentojn por anime sin tiri el mizeroj. Ne estas malfacile trovi lingvajn dub-

formojn kaj eĉ evidentajn erarojn en tiuj spontanaj poemoj. Mi ne intencas elnombri ilin. Pli kritikinda eble estas la tro ofte arbitra ludo pri la vortordo, kiu supozeble povus lacigi ordinaran leganton preskaŭ ĝis malemo daŭrigi la legadon, precipe en la pli longaj poemoj, kie krome malegalaj proporcioj inter ideriĉo kaj vortabundo riskas senentuziasmiĝon. Sekve la poeto plej sukcesas en mallongaj poemoj, kie burĝonas lia profunda amo al la naturo:

*Trans varma ondo hela, trans ondo aera,
trans ondo libera,
trans kanto la matura, mejloj da hordeo,
trans ter' malaperanta en milda zefiro,
trans loga ŝoseo,*

alta montaro spiras en abunda brilo
(Adoleska kanto p. 18)

Kiu dismetas diamanton

sur la lazuron de aŭgusto?

Kiu dismetas l' eleganton

sur ĉielkampon de aŭgusto?

Gracia la bril'

angĝela pupil'

.....

(Kiu dismetas? p. 24).

En letero de Raymond Schwarz al la poeto, presita fine de la libro, ni legas jenan bonan konsilon por poetoj, kiuj danĝerigas la poezian valoron de siaj poemoj per plata elokvento: „Antaŭ ol ekverkii skribu en proza formo, kiel eble plej mallonge, kion vi intencas diri. Poste rediru tion per versoj, sed zorgu, ke via versaĵo ne fariĝu esence pli longa ol estis via proza projekto“. Nisimura-Masao certe konsciis pri la vereco de tiuj vortoj, kvankam li ofte nekonforme verkis. Sed lia spirita majesto varmigis ĉiun verson, kaj ni facile pardonas iujn artismajn mankojn. La neĝflora puro de l' *Edelvejso* vojmortile konfirmas pri la ĝusta direkto de nia altostrebo.

Baldur Ragnarsson

RAKONTOJ* el la naciliberiga batalo de jugoslavaj popoloj; elektis kaj tradukis A. Sekelj. „Nova Libro“ serio No. 5. Eld. Serbia Esp. Ligo, Beograd 1956. 34 p. 12x17, broŝ. Prezo: 60 din. aŭ 3 steloj.

La heroeco de la jugoslavaj partizanoj estas famekonata, ĉe amikoj kaj eks-malamikoj same. Paroli pri preseraroj aŭ plendi pri neologismoj (eĉ tiuj al la poezio limigendaj sinonimoj por la malvortoj) ŝajnas preskaŭ malrespekto al la tiel heroe suferintoj kaj mortintoj.

Naŭ rakontoj pentras por ni diversajn fazojn de la batalo; sep anekdotoj spicas per senrida humuro ties ĉiaspecajn kruelaĵojn kaj suferojn. Brilas tra la tuto la nevenkebla kuraĝo. Plej kontentiga el literatura vidpunkto estas la rakonto pri Avino Spasenia; ne mirige, ĉar la aŭtoro estas neniu alia ol la plej famekonata poeto de nuntempa Kroatio, Vladimir Nazor, kiu je la aĝo de pli ol 65 jaroj mem militis inter la partizanoj. Inter tiom da herooj la de li priskribita maljunulino, elstare reliefigas. Ŝi indas komparan kun alia maljunulino, priskribita de la itala poeto Petrarko, en unu el liaj leteroj.

Dekdu jarojn post la okazaĵoj aperas ĉi tiu libreto. Ĉu iu ne volas esti memorigata? Estus sendanke, eble eĉ danĝere, forgesi. Ĉi tiu verketo garantias, ke ni ne forgesos.

D. B. Gregor.

AN ESPERANTO VOCABULARY. Listo de 3.000 vortoj, kompilita de C. Veness, F.ino E. W. Tegg kaj J. H. Sullivan. Eldono de S.B.E.T. (Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj), 183 Woodlands Park Road, Birmingham 30. Prezo 3.5 steloj.

La vortlisto estas bone elektita, pli ol mezbone tradukita kaj tre oportune aranĝita. Estis konsilinde eviti la neologismon „feroca“, kiu troviĝas nek en la Plena Vortaro nek en ties Suplemento. Se diversloke mi trovis vorton pli bone tradukeblan, tio verŝajne nur dokumentas mian personan opinion, ke verkadon de konversaciaj vortaroj oni devus konfidi, ne al vortaristo aŭ pedagogo, sed al kiel eble plej sperta verkisto. J. V.

LA VOJO DE LA VERO KAJ LA SAGO, aŭ, *La Vero, malkaŝita en la Biblio, kiel io distingebla de la Kristana Teologio*. 32 p. 11.5 x 18.5. Senpage kaj aŭfrankite havebla de A. H. Broughton, The Square, Gunnislake, Cornwall, Britujo.

Per la titolo de tiu ĉi verketo oni komprenas, pri kio temas. Ankoraŭ unu persono, per elektitaj citaĵoj el la Biblio, klopodas konvinki nin, ke li trovis (aŭ ekkonis) La Veron. Homoj kun tiu speciala gusto supozeble trovos la verkon interesa.

RESUMA HISTORIO DE LA ESPERANTO-MOVADO. Kompilis Jaroslav Marik. 37 p., multobligite. 20 x 28.5. Ne ĝenerale aĉetebla.

Tre kompakte kaj koncize, tamen informplene, samideano Marik kompilis tiun ĉi historion el ne plu haveblaj fontoj kun aldonado de informoj pri la ĉeĥoslovaka movado postmilita, por utiligo en sia lando, kie provizore ne eblas eldoni aŭ aĉeti esperantajn librojn. Tute certe la Resumo donas klaran superrigardon super la historio de Esperanto, kaj ĉiu nova esperantisto, kiu ĝin studas, staros sur firma fundamento rilate nian aferon. Ke baldaŭ venu la tago, kiam ĝi povos aperi presite, ĉar ĝi estus utila ne nur en Ĉeĥoslovakio!

NIA FORUMO

Mondo

Vi certe miris ke, kontraŭe al mia an-aŭa informo, No. 4 de **Mondo** ne aperis. La kaŭzo estas ke ne pagis iuj ŝuldantoj kun kies pago mi kalkulis por eldoni tiun numeron kaj mi mem ja ne povas ankoraŭ pli grandigi nunmomente la deficiton.

Mi vendis mian domon por pagi la deficiton. Mia financa situacio estas do, kvankam dolore, reguligita kaj mi povas nun rekomenci la batalon.

Mi neniel dubas ke mi baldaŭ sukcesos reldoni **Mondo**'n sur firma bazo kaj mi esperas ke tiam la esperantistoj apogos min pli efike ol ili faris ĝis nun, kvankam profitante la faritan sperton, mi ne kalkulos kun tiu apogo.

Mi tre ŝatus se vi volus ankoraŭ publikigi tiun ĉi leteron, havigante tiel al mi la okazon esprimi mian sinceran dankon al tiuj — malmultaj — samideanoj kiuj komprenis la gravecon de nia entrepreno kaj — kelkaj eĉ multe — helpis por sukcesigi ĝin. Ili ne bezonos bedaŭri sian helpon, ĉar **Mondo** estos tre baldaŭ ree grandskale distribuata.

Mi sincere dankas vin anticipe por la publikigo de tiu ĉi letero kaj salutas vin.

Samideane, H. Boffejon.

Peresperanta agado

Laŭ raportoj el la konferenco de U.N.E.S.C.O. en New Delhi 1956, unu el la delegitoj diris koncerne la demandon pri Esperanto ke U.E.A. faris pli da propaĝado por Esperanto ol por U.N.E.S.C.O. Kvankam subskribinto mem estas fervora esperantisto mi tamen volas konfesi ke la menciita delegito parte pravus en sia aserto ĉar ankoraŭ multaj el ni „verduloj“ tro grandskale agas laŭ la devizo „per esperanto por esperanto“. Ju pli ni ampleksigos nian peresperantan agadon ankaŭ pri aliaj celoj ol Esperanto des pli rapide ni atingos nian venkon. Ekz. unu el la monataj eldonoj de la revuo „**Esperanto**“ povus de tempo al tempo enhavi raportojn, artikolojn, informojn k.s. preskaŭ nur pri la agado de U.N.E.S.C.O. Kial ne?

Ebe, Svedio

Pensoj de simpla Esperantisto pri Esperantomovado

En la kvara eldono de la Plena Vortaro, paĝo 47 staras sub la vorto „aŭdac“, numero 2: „la malkoncentriĝo de nia organizado ebligis ĉiajn aŭdacojn al niaj kontraŭuloj“. Mi pensas, ke tiu ekzempla frazo estas ankaŭ aŭ almenaŭ povas esti rilatigita al la Esperantomovado; des pli mi pensas tion, ĉar bedaŭrinde tiu frazo konvenas por ni Esperantistoj jam multajn jarojn en la historio de la E-movado.

Pluraj diverstendencaj Esperanto-organizaĵoj ekzistas. Tamen, tio ne malhelpas. Eble estas eĉ pli akcele al la E-movado, ol se ekzistus nur unu sola organizaĵo, ĉar estas evidente, ke ĉiu Esperantisto povas en sia propra medio, ĉu politika, ĉu religia, ĉu iu ajn, plej bone efiki por

la progreso de la Esperantismo. Sed ĉe Dia volo, la diversaj mondkonceptoj kaj religioj malgraŭ antagonismoj ja ne povas malhelpi, ke ĉiaj Esperantistoj sin trafu — apud ilia fekunda laboro en la propra organizaĵo, kaj sen fordoni la konceptan kaj organizan suverenecon de ĝi — al kunlaboro, almenaŭ en la decidaj punktoj de la komuna celo: venko de Esperanto! Kaj tio en loka, landa, kaj monda skalo.

La estraroj aŭ elektitaj estraranoj de ĉiaj E-asocioj devus interkonsiliĝi pri komuna celkonscia agado laŭ la donitaj kaj farotaj eblecoj por la progreso de la Esperantismo. Tre bone estus, se ili povus krei komunan, unikan kaj bonreputacian Esperanto-gazeton (se eble ĉiusemajnan), per kiu oni pli bone povus varbi por nia afero ol per tiom multe da pli aŭ malpli sensignifaj gazetoj kaj revuoj. Ili devus krei la „**Verdan Fronton**“, la komunan „**Esperanto-Mondkinton**“, la „**Kongreson de la Tutmonda Interkompreniĝo**“ (granda Manifestacio

por la Esperantismo kaj por la paco, okazonta eble ĉiun trian jaron) kaj ili devus eduki la Esperantistojn al veraj „**Kavaliroj de la Verda Stelo**“ (kiuj ne plu farus pamfletojn kontraŭ laŭrojn meritintaj aŭ iuj ajn samideanoj). Lastajn kvar punktojn proponis la ŝatata redaktoro de „**Heroldo de E**“ jam 1940, kiel celon post la milito. Bedaŭrinde la Esperantistaro ĝis nun senage preteriris tiun, sian devon. Malgraŭ la gravegaj sukcesoj akiritaj per saĝa ĝvidado de UEA nuntempe, neniu povas kontesti, ke ni estas organize preskaŭ ankoraŭ sur la sama ŝtupo kiel post la unua mondmilito, ĉar la Esperantistaro ĝis nun ankoraŭ ne kapablis koncentrigi ĉiajn siajn fortojn. En la alia kazo, verte la sukcesoj estus ankoraŭ multe pli grandaj. Mi trovas, ke tiu urĝa afero estas multe tro malmulte traktata en la E-movado kaj meritas diskuton.

Gottfried Hofstätter,
Schwimmschulstrasse 15,
Steyr, Aŭstrujo.



OFICIALA KOMUNIKO

n-ro 8 Majo 1957

Antaŭkongresaj Manifestacioj: La solaj antaŭkongresaj manifestacioj agnoskitaj de la Loka Kongresa Komitato estas:

- Kulturaj Internaciaj Ferioj: „La evoluo de l'civilizoj kaj la moderna socio“
Kastelo Grésillon de la 14-a ĝis la 24-a de julio 1957
- Oficiala Antaŭkongreso en Parizo:
Palaco de UNESKO de la 31-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto
- 27-a Internacia Kongreso de la Blindaj Esperantistoj:
Liono de la 30-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto
- 13-a Internacia Junular-Kunveno:
Villeneuve-lès-Avignon de la 27-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto.

Oficiala antaŭkongreso: La prepara Komitato konsideras tri kategoriojn de Hoteloj:

1. prezo kun matenmanĝo 1.100 ĝis 1.350 Fr.
2. prezo kun matenmanĝo 800 ĝis 950 Fr.
3. prezo kun matenmanĝo 600 ĝis 750 Fr.

42-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Marseille — 3.10 aŭgusto 1957 —
Francujo

Adreso: 32, Cours d'Estienne D'Orves,
Marseille, Francujo.

Telefonoj: PRado 55-46; FErréol 96-18.

Telegrafo: Esperanto.

Banko: James Rosa, Marseille.

Ĝirkonto: Groupe Esperantiste — Mar-

seille n-ro 156-15.

Sub la protektado de S-ro René COTY,
prezidanto de la Franca Respubliko.

Adreso de la Loĝiga Servo: s-ro Jean
Thierry, 26 rue Molière, Paris 1.

Kongresaj sekcioj: La Estraro de U.E.A. decidis, ke la Kongreso laboru en tri sekcioj:

UNUIA SEKCIO: Esperanto en la Edukado (en kunlaboro kun ILEI). Prezidanto: s-ro D. Kennedy.

DUA SEKCIO: La Internacia Lingvo en Science kaj Teknika (organizita de UEA kaj ISAE). Prezidanto: Prof. D-ro Ivo Lapenna.

TRIA SEKCIO: Esperanto en Komercio kaj Turismo. Prezidanto: S-ro P. Petit.

Statistiko: (ĝis fino de aprilo) Alĝerio 4, Aŭstrujo 22, Aŭstralio 1, Belĝujo 13, Brazilo 4, Britujo 67, Bulgarujo 23, Ĉeĥoslovakujo 5, Danlando 26, Finnlando 10, Francujo 343, Germanujo 91, Grekujo 1, Hispanujo 32, Hungarujo 2, Italujo 110, Izraelo 1, Jugoslavio 42, Japanujo 2, Kongo Belga 2, Maroko 14, Meksikio 2, Monaklando 3, Nederlando 41, Norveĝujo 14, Novzelando 2, Pollando 7, Portugalujo 5, Rumanujo 2, Sudafriko 2, Svisujo 20, Svedujo 103, Turkujo 2, Usono 6, Venezuelo 1. Entute 1025 el 35 landoj.

Konstanta Kongresa Sekretario
Gian Carlo Fighiera

NEKROLOGO

Ahnfeldt. Mortis ĉefinstruisto Fritiof Ahnfeldt, del de UEA en Rödeby, Svedujo, la 21.2.57. Li estis unu el la plej fervoraj esperanto-pioniroj de la sudsveda provinco Blekinge, kie li antaŭ dudek jaroj gvidis multajn esperantokursojn eĉ en la radio Karlskrona, ktp.

Costajussà Vilardell. La 10an de februaro forpasis en la aĝo de 82 jaroj s-ano Antonio Costajussà Vilardell, en Sabadell, Hispanujo. Plurfoje li rolis kiel komitatano de la iama Esp.-klubo „Ap-lec“. Aktive partoprenis la postmilitan urban Esperanto-movadon.

Geerinck. En Sint-Niklaas, la 31an de marto 1957, forpasis 69-jara s-ro Pierre-

René Geerinck, Delegito de UEA.

Latimer. Mortis pro aŭtobiciklo-akcidento s-ro Richard Fox Latimer, la 7an de aprilo '57. Li estis komitatano de Aŭstralia Esperanto-Asocio. Li dejoris ĉe la Aerstacio de la Mararmeo en Schofields, N.S.W., kaj tie li fondis Esperanto-klubon. Ĉe lia kremacio, oni faris Esperanto-prelegon; kaj la pastro anoncis oficiale, ke tio estas okazo unika en la historio de la mararmeo, ke oni invitis eksteran organizon partopreni mararmean solenon.

Le Coze. Nica Esperanto-Grupo funebrias pri S-ro Emile Le Coze, 76-jara, kiu mortis la 4an de aprilo post mallonga malsano. Li longatempe instruis Esperanton en Bretonio kaj fervore propagandis ĝis sia forpaso.

Passos. En Fortaleza, Ceara, Brazilo, mortis s-ro Secundino Ferreira Passos, la 23an de februaro 1957. Kiam li estis 65-jara, li donacis grandan sumon por la propagando de Esperanto, kvankam li tute ne konis la lingvon: li nur konis la ideon laŭ la propagando, kiun li regule legis en revuo dum 13 jaroj. La redaktoro de la revuo sendis al li lernolibrojn, kaj li entuziasme eklernis kaj legadis tutan bibliotekon en Esperanto kun jurnarda fervoro.

Sievers. Je la 19a de marto pro subita koratako mortis s-ro Edwin Sievers, 2016 West Alexandrine Ave, Detroit 8, Michigan, Usono, je aĝo de 65 jaroj. Multjara membro de EANA kaj fidela subtenanto de UEA, li multe laboris por nia afero.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

N-ro 294

La 1-an de majo 1957

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de aprilo kaj ankaŭ por komparo, je la fino de aprilo 1956:

	1956	1957
Asociaj membroj	7288	6601
Individuaj membroj		
MJ	716	662
MA	3722	4807
MS	657	600
Pat.	9	5
DM	290	303
HM	54	52
JM	—	11
JMA	—	79
	<u>5448</u>	<u>6519</u>
	12736	13120

DELEGITOJ

Aŭstralio
Bruce Rock D.: vakas.
Wodonga D.: vakas.

Aŭstrujo
Pöls ob Judenburg (Steiermark) D.: s-ro Rudolf Wick, oficeja konsilisto, Gemeindeamt.
Wien VD: D-ro Ernst Joseph Görlich, altlerneja lektoro, Waehringerstr. 59.

Belgujo
Antwerpen D.: vakas.
Antwerpen FD (turismo): vakas.

Britujo
London S.W. 12 D.: s-ro Philip Buttinger, instruisto, 48, Ormeley Rd. Balham.
London FD (katolikismo): vakas.

Finnlando
Jyväskylä D.: vakas.
Kuopio FD (rotario): S-ro Vilho Ruot-salainen, direktoro, Kirkkokatu.
FD (komerco): vakas.
Tainionkoski D.: vakas.

Francujo
Hyerès D.: vakas.
Moulins FD (mehaniko): S-ro Andre Baudat, mehanika laborejestro, 20 Route de Lyon, Yzeure (Allier).

FD (rotario): s-ro Marcel Genermont, arkitekto, 11 Place de la Republique.
Nice FD (turismo): vakas.

Germanujo

Berlin-Borsigwalde JD: s-ro Peter Mentzel, seruristo, Eichborndamm 144 III.
Heubach (Württ.) JD: s-ro Peter Beiswanger, studento de matematiko, Möglinger Str. 40a.

Hispanujo

Oviedo D.: S-ro Luis Garcia Fernandez, vojaĝoficisto, Str. Victor Chavarri 7-1°.
Valencia FD (komerco-teksaĵoj): vakas.

Italujo

Torino FD (komerco): S-ro Carlo Dogliani, kontoristo, Corso Gabetti 9.

Nederlando

Driebergen D: S-ino H. E. te Strake-Leafers, eks-instruistino, Bouwlust 22.
Pijnacker D: S-ro Paulus Rodenburg, terkulturisto, Westlaan 59.

Pollando

Bydgoszcz FD (industrio): S-ro Franciszek Lemańczyk, ekonomisto, Osiedle Lesne bl. 46 m 32.
Gdynia D: S-ro Stanislaw Winnicki, ŝipano (oficiro), ul. Starowiejska 14/6.

Warszawa FD (turismo): S-ro Tadeusz Pleskaczyński, inĝenero, ul. Niemce-wicza 5 A m 7.

Sudafriko

Vryheid (Natal) D: S-ro Edwin de Kock, instruisto, High School.
FD (adventismo): la D.

Svedujo

Rödeby (Blekinge) D: vakas

Turkujo

Ankara VD: S-ro Cevdet Yalvac, instruisto, Atatürk Lisesinde Latince Öğretmeni.

Urugvajo

Montevideo JD: F-ino Mary Z. Rocha, studentino, Dr. Enrique Pouey 2336.
FD (muziko; horkantado): D-ro Walter Heimann, muzikisto, Charrúa 2747 AP 9.

Paysandú D: S-ro Félix O. Borthagaray, licea instruisto, 19 de Abril No. 1022.

Usono

Oxford (Massachusetts) D: vakas.
FD (botaniko): vakas.
Washington D: S-ro William Edward Baff, advokato, 610 C Street S.E.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Peterson, S-ro Ch. E., Downey, Usono.
Rössler, S-ro Helmut, Mainz, Germanujo.
Schwing, S-ro Alfred, Strasbourg, Francujo.
Rees van den Ende, S-ino I. A. J. M., Rotterdam, Nederlando.
Svarstad, S-ro Iver, Los Angeles, Usono.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1957

389 Keller, s-ro Ad., La Celle-st.-Cloud, Francujo.
390 Mila, s-ro Eugène, Drancy, Francujo.
391 Motto, s-ro Roger, Avignon, Francujo.
392 Permanne, s-ro E., Fécamp, Francujo.
393 Yelland, s-ro E. E., Aspremont, Francujo.
394 Bettges, s-ro Johann, Duisburg-Meiderich, Germanujo.

- 395 Carstensen, s-ro Th., Ahrensök, Germanujo.
- 396 Dahlmann, s-ro Erich, Berlin-Frohnau, Germanujo.
- 397 Dresselhaus, s-ro Heinrich, Schloss Holte, Germanujo.
- 398 Dücker, s-ro Alfred, Bebra, Germanujo.
- 399 Fritsch, d-ro Erdmann, Clenze, Germanujo.
- 400 Henneberg, d-ro Theodor, Kamen, Germanujo.
- 401 Janssen, s-ro Fritz, Oldenburg, Germanujo.
- 402 Jolliet, s-ro Leo, München, Germanujo.
- 403 Kind, s-ro Ernst, Bonn, Germanujo.
- 404 Kreutzer, d-ro Job, Frankfurt am Main, Germanujo.
- 405 Lamprecht, d-ro Hermann, Essen, Germanujo.
- 406 Michalik, s-ino Frieda, Hösel, Germanujo.
- 407 Treude, d-ro Wilhelm, München, Germanujo.
- 408 Vosteen, s-ro Karl, Wüstring, Germanujo.
- 409 Wuenschel, s-ro Hans Ph., München, Germanujo.
- 410 Fernández, s-ro Fernando, Lugo, Hispanujo.
- 411 Ménéndez Gonzáles, s-ro A. Gijón, Hispanujo.
- 412 Molera Pedrals, s-ro Ramon, Barcelona, Hispanujo.
- 413 Campetti, Prof. d-ro Gaetano, Lucca, Italujo.
- 414 Furlan, s-ro Mario, Trieste, Italujo.
- 415 Pacelli, s-ro Prof. Giuseppe, Pisa, Italujo.
- 416 Zacchè, s-ro Fernando, Mantova, Italujo.
- 417 Bogdan, s-ro Inđ. Jerković, Sarajevo, Jugoslavio.
- 418 Nenadic, s-ro Drago, Bjelovar, Jugoslavio.
- 419 Strah, s-ro Gabrijel, Ljubljana, Jugoslavio.
- 420 Šaponjić, s-ro Inđ. M., Beograd, Jugoslavio.
- 421 Zagradišnik, s-ro Franec, Trbovlje, Jugoslavio.
- 422 Collins, s-ro Edward, Toronto, Kanado.
- 423 Hackett, s-ro W. D. B., Toronto, Kanado.
- 424 Maier-Bevel, s-ino Alice, Vancouver, Kanado.
- 425 Smilga, s-ro Kriss, Toronto, Kanado.
- 426 Tuch, s-ino R., Toronto, Kanado.
- 427 Boute, f-ino Cécile, Matadi, Kongo Belga.
- 428 Amaral, s-ro Inđ.Hugo, Funchal, Madejro.
- 429 Bink, f-ino A. B. M., Rotterdam, Nederlando.
- 430 Geerligs-la-Croix, s-ino M. C., Amsterdam, Nederlando.
- 431 Hoekma, s-ro A., Den Haag, Nederlando.
- 432 Reisaeter, s-ro Trygve, Odda, Norvegujo.
- 433 Tveit, s-ro M., Stavne, Norvegujo.
- 434 Clarkson, s-ro R. J., Tauranga, Novzelando.
- 435 Donovan, s-ro W. J., Wellington, Novzelando.
- 436 Ravelich, s-ro M. J., Wellington, Novzelando.
- 437 Thawley, s-ro E., Wellington, Novzelando.
- 438 Rego, s-ro M. Lopes do, Lisboa, Portugalujo.
- 439 Sales, s-ro Alfredo L., Leiria, Portugalujo.
- 440 Almén, s-ro Helmer, Stockholm, Svedujo.
- 441 Andersson, s-ro Lars, Hoje, Svedujo.
- 442 Dahl, s-ro Einar, Uddevalla, Svedujo.
- 443 Edler, s-ro Per, Lund, Svedujo.
- 444 Fingalsson, s-ro B., Gisebo, Svedujo.
- 445 Gerdman, s-ro Birger, Stockholm, Svedujo.
- 446 Hakansson, s-ro Hugo, Traryd, Svedujo.
- 447 Jensie, s-ino, Märta, Jönköping, Svedujo.
- 448 Lindberg, s-ro Torsten, Prässebo, Svedujo.
- 449 Persson, s-ro Olle, Trelleborg, Svedujo.
- 450 Tell, s-ro Leander, Norrköping, Svedujo.
- 451 Turner, s-ro Fred, Linköping, Svedujo.
- 452 Cao, s-ro V. L., Montevideo, Urugvajo.
- 453 Garcia, s-ro Rodolfo, Montevideo, Urugvajo.
- 454 Heimann, d-ro Walter, Montevideo, Urugvajo.
- 455 Klein, s-ro Alfredo, Montevideo, Urugvajo.
- 456 Ayres, s-ro C. N., Saugus, Usono.
- 457 Bartsch, d-ro E., Burbank, Usono.
- 458 Brown, s-ro Allan L., West Hempstead, Usono.
- 459 Buchheim, s-ro Walter A., Denver, Usono.
- 460 Bush, s-ro Jarvis E., Milwaukee, Usono.
- 461 Carlson, s-ro F., Seattle, Usono.
- 462 Dillinger, s-ro H. E., Placerville, Usono.
- 463 Jones, f-ino Princess O. Jones, Kansas City, Usono.
- 464 Lewine, s-ro John L., New York, Usono.
- 465 Lowe, s-ro Eldred W., Kansas City, Usono.
- 466 Nace, s-ro Paul E., Baltimore, Usono.
- 467 Poehlmann, s-ro Oscar, Ecorse, Usono.
- 468 Sayers, s-ino Eda T., Lilie, Usono.
- 469 Sayers, s-ro J. D. Lillie, Usono.
- 470 Sievers, s-ro E., Detroit, Usono.
- 471 Simon, s-ro Werner, Memphis, Usono.
- 472 Simpson, s-ro W. P., Harrisburg, Usono.
- 473 Solin, s-ro Paul, San Diego, Usono.
- 474 Swenson, s-ro H. F., Rifle, Usono.
- 475 Burstin, s-ro S., Melbourne, Aŭstralio.
- 476 Ehrlich, s-ro B. Sydney, Aŭstralio.
- 477 Linton, s-ro K. G., Melbourne, Aŭstralio.
- 478 Maddern, s-ro I. T., Woodonga, Aŭstralio.
- 479 Parry, s-ro S. L., Albion, Aŭstralio.
- 480 Whillans, s-ro Robert G., Croydon, Aŭstralio.
- 481 Winchcomb, s-ro C. Welland, Aŭstralio.
- 482 Meister, d-ro Oskar, Graz, Aŭstrujo

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1957

Stato je la 30-a de aprilo 1957

Konkurso I

Lando	Kvoto	Poetoj	%
1. Usono	2016	2550	126.48
2. Nederlando	4894	5207	106.39
3. Danlando	1910	1805	94.50
4. Finnlando	2687	2465	91.74
5. Hispanujo	2092	1915	91.54
6. Francujo	6575	5915	89.96
7. Svislando	1910	1700	89.—
8. Belgujo	1952	1728	88.52
9. Italujo	3620	3185	87.98
10. Britujo	7351	6279	85.42
11. Svedujo	6895	5810	84.26
12. Germanujo	6515	4315	66.23
13. Norvegujo	2113	1360	64.36

14. Brazilo	6985	4494	64.34
15. Jugoslavio	3563	1550	43.50

Konkurso II

Lando	Kvoto	Poetoj	%
1. Aŭstralio	1025	1008	98.34
2. Aŭstrujo	1400	1360	97.14
3. Sudafriko	230	215	93.48
4. Portugalujo	580	520	89.55
5. Novzelando	942	790	83.86
6. Urugvajo	325	270	83.08
7. Japanujo	1210	975	80.58
8. Kanado	500	390	78.—
9. Izraelo	290	220	75.86
10. Islando	405	235	58.02
11. Maroko	1061	450	42.41

N.B. Montriĝis korekte altigi la kvoton de Aŭstrujo ĝis 1400.

- 483 Pich, S-ro Jozefo, Kaltenleutgeben, Aŭstrujo.
 484 Schmidt, Pastro Anton, Graz, Aŭstrujo.
 485 Wick, S-ro Rudolf, Pöls ob Judenburg, Aŭstrjo.
 486 Boeren, S-ro M., Antwerpen, Belgujo
 487 Blacklock, S-ino A. L., Ipswich, Britujo.
 488 Blacklock, S-ino L. E., Parkstone, Britujo.
 489 Denton, S-ino M. T. D., London, Britujo.
 490 Dodson, S-ro H., Wirral, Britujo.
 491 Sinclair, F-ino P. C., Buckhaven, Britujo.
 492 Worcester, S-ino Doris M., Blackheath, London, Britujo.
 493 Ajolov, S-ro Toma ul. Trakia, Plovdiv, Bulgarujo.
 494 Drajev, S-ro Dimitar, Sofia, Bulgarujo.
 495 Grigorov, S-ro Asen, Sofia, Bulgarujo.
 496 Möller, S-ro Poul, Viborg, Danlando.
 497 Arrieu, S-ro F., Toulouse, Francujo.
 498 Beliard, S-ro Luc, Nantes, Francujo.
 499 Brault, S-ro B., Argenteuil, Francujo
 500 Buerick, S-ro R., Calais, Francujo.
 501 Chicot, S-ro Emmanuel, Paris, Francujo.
 502 Delaire, S-ro Pierre, Orleans, Francujo.
 503 Dessapt, S-ro M., Thiers, Francujo.
 504 Gaillard, S-ro André, Paris, Francujo.
 505 Joly, S-ro A., Besançon, Francujo.
 506 Lavallée, S-ino H. Sanvic, Francujo.
 507 Nuidan, S-ro Auguste, Savigny-les-Beaune, Francujo.
 508 Zins, F-ino J., Metz, Francujo.
 509 Barkhausen, S-ro Heinz, Bremen, Germanujo.
 510 Bepperling, S-ino Anneliese, Wetzlar, Germanujo.
 511 Berger, S-ro J. G., München, Germanujo.
 512 Böhmke, S-ro Paul, Wiesbaden, Germanujo.
 513 Doering, F-ino Johanna, Berlin, Germanujo.
 514 Epstein, S-ro Felix, Hamburg, Germanujo.
 515 Gründler, S-ro M., Frankfurt, Germanujo.
 516 Hauber, S-ro R., Bad Aibling, Germanujo.
 517 Haus, S-ro Joseph, Düsseldorf, Germanujo.
 518 Hering, S-ro A., Nürnberg, Germanujo.
 519 Huch, S-ro Willi, Mainz, Germanujo
 520 Iffländer, S-ino Elisabeth, Reichersbeuern, Germanujo.
- 521 Link, S-ro Karl, Heidelberg, Germanujo.
 522 Michling, S-ro Inq. Horst, Göttingen, Germanujo.
 523 Rosenstengel, S-ino Käte, Nordhorn, Germanujo.
 524 Siffrin, S-ro Hans, Stolberg, Germanujo.
 525 Wilke, S-ro Harry, Berlin, Germanujo.
 526 Wingen, S-ro Wilhelm, Köln-Sülz, Germanujo.
 527 Olafsson, S-ro Ingimundur, Reykjavik, Islando.
 528 Cassinis, S-ro Mario, Novaro, Italujo.
 529 Tršar, S-ro Drago, Dol Logatec, Jugoslavio.
 530 Frutoso, S-ro, Meknes, Maroko.
 531 Guibert, S-ino, Port Lyautey, Maroko.
 532 Gorbatoff, S-ino, Oujda, Maroko.
 533 Knecht, S-ro F., Casablanca, Maroko.
 534 Rousseau, S-ro Henri, Rabat, Maroko.
 535 Van Dat, S-ro, Port Lyautey, Maroko.
 536 Rosbach, S-ro Hans A., Tromsø, Norvegujo.
 537 Stjernesund, S-ro E., Lilleström, Norvegujo.

DONACO AL LA GENERALA KASO:

E. Biddle, Britujo 8.25 gld.; R. Sparks, Usono 1,90 gld.

DONACO AL A.P.O.:

F-ino N. Hanson, Britujo. 5,33 gld.
 Al la donacintoj koran dankon.

LA OFICEJA ILARO DE U.E.A.

La pli granda membronombro de UEA, la ĉiam pli larĝaj aktivecoj de la Asocio kaj la malgranda nombro de oficejoj postulas ĉiam pli racian aranĝon de la oficejaj laboroj. Neevitebla estas modernigo de la oficeja ilaro per diversaj aparatoj, diktomaŝino, kalkulmaŝino, librotena sistemo ktp. Ĉar la ordinaraj enspezoj de la Asocio neniel povas kovri tiajn ekstrajn elspezojn, la Estraro direktis sin antaŭ kelkaj monatoj per cirkulero al la esperantistoj petante ilian helpon por akiri la plej urĝe bezonatajn objektojn. La rezulto estis, ke rapide kolektiĝis sumo sufiĉa por aĉeti la unuajn maŝinojn, i.a. diktomaŝinon, nun ĉiutage konstante uzatan en C.E.D.

Necesa estas i.a. sama maŝino ankaŭ por la Centra Oficejo.

En la nomo de la Estraro ni nun direktas alvokon al ĉiuj helpemaj esperantistoj pere de nia gazeto, kontribui al la Fondajo „Oficeja Ilaro”. Pagojn akcep-

tas ĉiuj kutimaj adresoj.

Oni nepre indiku la celon de la pago. Jen sekvas la nomoj de la ĝisnunaj kontribuintoj por tiu ĉi grava celo kiu devos ebligi la glatan funkciadon de niaj oficejoj:

Prof. D-ro G. Canuto; Prof. D-ro I. Lapenna; H. W. Holmes OBE; R. Liech-Walter; E. Malmgren; Inq. J. R. G. Isbrucker; H. Kürsteiner; C. Stöp-Bowitz; O. C. Lange; L. Minaj; D. Dalmau; E. Lapenna; R. Sakowicz; R. Rian; G. C. Fighiera; M. H. Vermaas; E. Tison; E. Robin; E. Gasse; Ch. J. Brunet; A. Humez; A. Ploussu; A. Frangeul; D. Chagnoux; A. Giroldi; A. Paroni; A. Duncan; W. J. Drummond; C. Nelson; S. Ackers; F. D. Priestman; E. B. Knight; G. Anderson; K. Olsson; S. Sundin; R. Emson; Sveda Esp. Federacio; KELL-Rondo, Stokholmo; S. Roelofsen; Dro. J. Prins; Frisa Rondo, Leeuwarden; J. P. van Dijk; J. H. Döbken; Dro. G. F. Makkink; Dro. W. P. Roelofs; J. E. Bramkamp; LEEN-Sekcio Amersfoort; E. Haubrich; Dro. G. J. van Lookeren Campagne; H. v. d. Adel; F. E. Helmuth; J. Murray; L. Berthold Schmidt; R. E. Holland; A. Concellaar; E. Kind; Esperanto Societo Vinokovci; P. Williams; P. de Cleene; D. Ivanov; H. Tonev; A. Argyropoulos; P. R. Geerinck; E. Lefebvre; J. Hérion; C. Sonnenfeld; R. Vaughan; R. Raven Hart; O. Wüster; A. C. L. Moutinho; H. Agnar; E. Maynar; Esperanto-Societo Zürich; A. E. Schweizer; P. Métiévier.

Al ĉiuj donacintoj nian plej koran dankon. Ke baldaŭ multaj aliaj sekvu ilian ekzemplon!

MEMBRONOMBRO KAJ STATISTIKO

En la maja numero de la revuo Esperanto estis menciite, ke la fina cifero de la membronombro en 1956 estas 25.181.

Atingis nin demandoj per kiuj evidentiĝis, ke ne al ĉiuj membroj estas klare, kiel nia membronombro kutime estas kalkulata, Nome, oni demandas, kiel estas evitebla duobla kalkulado en kategorioj de Asociaj kaj Individuaj membroj. La afero estas simpla:

Antaŭ ĉio ni devas akcenti, ke kalkulataj estas nur tiuj membroj por kiuj la pago de la kotizo estas ricevita. La ĉefdelegitoj kaj perantoj sendas al nia oficejo la pagojn por la individuaj membroj. La aliĝintaj landaj asocioj pagas al ni la kotizojn nur de tiuj asociaj membroj, kiuj ne estas individuaj membroj.

Sekve, duobla kalkulado ne estas ebla. La publikigita cifero donas la ekzaktan nombron de la membroj en ĉiuj kategorioj.

Kelkfoje iuj landaj asocioj pagas treege malfrue, eĉ longe post la fino de la koncerna jaro, kiel montris la informo en la estrara artikolo en la maja numero. Tio, kompreneble, estas tre neoportuna.

En la statistiko en la hodiaŭa numero oni vidas, ke jam ni atingis konsiderinde

Radio Roma

Radio Roma. 4-VI, Kvinjara jubileo de la Esperantista Kulturdomo „Kastelo Grésillon”; 7-VI, Pentekosto; 11-VI, Junio; 14-VI, Leterkesto kaj bibliografio; 18-VI, Novajoj el Italujo; 21-VI, Antonio Canova, okaze de la 200-a naskiĝa datreveno; 25-VI, Kvina festivalo de la Napola kanzono; 28-VI, Nova aranĝo de la elementa lernejo en Italujo.

pli altan nombron da individuaj membroj ol je la sama dato en 1956, sed la nombro de la asociaj membroj estas malpli alta ol tiam. Tio signifas, ke pluraj landaj asocioj ankoraŭ ne reagis al nia peto frue pagi la kotizojn por asociaj membroj. Tial ni ĉi tie denove apelacias al tiuj organizadoj, pagi la AM-kotizojn kiel eble plej baldaŭ. Per tio ili multe povas kontribui al la glata funkciado de nia oficejo. Ni anticipe kore dankas pro tiu kunlaboro.

LA JARLIBRO DE U.E.A.

La Jarlibro 1957 Unua Parto eniris la mondon en la unuaj tagoj de aprilo. Ni estas konsciaj, ke ankaŭ en ĝi eraroj ne estis eviteblaj kaj ni afable petas al ĉiu, kiu trovas iun nekorektaĵon, tuj informi nin pri ĝi. Estas nia granda deziro es-tonte aperigi la jarlibron pli frue en la jaro. Por tio estos necese, ke la materialo, nome ĉiuj informoj, ŝanĝoj, aldonoj ktp. atingu nin multe pli frue. Tial ni jam nun petas ĉiujn interesitojn, sendi al ni materialon por jarlibro 1958 ĝis plej malfrue la 1-a de oktobro 1957.

Alia granda deziro nia estas kreskigi la nombron da reklamoj en la jarlibro. Por tio necesa estas la kunlaboro de ĉiu unuopa esperantisto kaj precipe de niaj delegitoj. En kelkaj landoj ili jam bonege laboras. Vidu ekz. la grandan nombron da reklamoj en Belgujo, Francujo, Germanujo kaj Italujo. Sed en aliaj ili preskaŭ tute mankas. Ni varme apelacias al niaj membroj en tiuj el la aliaj landoj, kiuj ne havas valutajn malfacilaĵojn montri nian jarlibron al turist-oficejoj, hoteloj, komercaj entreprenoj k.a. kaj akcenti, ke nia jarlibro donas al ili unikan eblecon aperigu reklamon egale komprenatan en 80 landoj de la mondo. Komencu jam nun energie varbi reklamojn por la venonta jarlibro. Ankaŭ ili atingu nin antaŭ la 1-a de oktobro 1957.

M. H. VERMAAS
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Londona Gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 s 6 p por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, „Flat Four”, 1 Warrington Crescent, LONDON W. 9, Anglujo, Telefono CUNningham 4487/N.

Koresponda Servo Mondskala. Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Britujo, Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Bulgarujo, Finnlando. Skribu, indikante viajn sekson, aĝon, profesion al: Daniel LUEZ, LAON (Aisne), Francujo kaj enmetu unu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

Spiritisma Grupo „E.E.E.” deziras kontakti kun spiritistoj el la tuta mondo. La samidealanoj sin turnu al adreso: Caixa Postal 507, Belo Horizonte (M.G.), Brazilo.

La nova Kristaneco, bazita je la doktrino de sveda sciencisto kaj reformanto Em.

Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akordigas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Lujzicka 21, Praha XII, Ĉeĥoslovakio.

Baldaŭ, Libervola Internacia Civila Servo starigos multnombrajn laborkampojn. Miloj da gejunuloj partoprenos. Esperantista ĉeesto utilos por propagandi esperanton S.C.V.I., 77 Jean Jaurès, Clichy (Seine) Francujo.

Seplingve parolanta fraŭlo en Laplando deziras korespondi kun fraŭlinoj el la sudaj landoj. Mi konas la tutan eŭropan kontinenton kaj volonte akceptos koresp. kun aliaj kontinentoj. Frederiko Neumeister, „Hotel-Laponia” Arvidsyjaur, Laplando, Svedujo.

14-jara knabo deziras alilandajn korespondantojn. Miaj interesoj estas: arkeologio, historio. Johano Jeffries, 22 Parr Road, Norwich, Britujo.

Hastings, Nov-Zelando. La tiea grupo anoncas Poŝtkartvesperon en Julio. Bonvolu kontribui al Sekretario, Esperanto Klubo, Box 16, Havelock North. Nov-Zelando.

Studento de Ekonomia Alt-Lernejo deziras korespondi pri ekonomiaj problemoj kun samideanoj en la tuta mondo. Stefan Nowak, Katowice-Ligota, str. Franciszkańska 17, Pollando.

Ortopedkuracistoj atentul Direktoro-ĉefkuracisto de Instituto por kripluloj deziras korespondi kun fakkuracisto pri kuracmetodoj de korpaj mankoj kaj statoj post poliomiellito, spasma, paralizo kaj kun flegisto pri kuracgimnastiko, kuracado per laboro. Li deziras interŝanĝi ĉi-temajn nacilingvajn fakgazetojn el okcidentaj landoj, unuavice el Usono kaj Kanado. Skribu al Ustav Mrzáckov, Bratislava, Brnenská 419. CSR.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn tutmonde. Marović Zvonimir, Ŝantiĉeva, 48 Mostar, Jugoslavujo.

Korespondoservo por Geedukistoj, geler-nantoj: S-ino Legoff, Les Andelys (Eure) Francujo. Indiku aĝon, temojn, landojn, deziratajn.

Fotoamatoro-domkonstruisto deziras korespondi kaj interŝanĝi fotobildojn kun ĉiuj landoj precipe ekstereŭropaj. Dreczkowski Zbigniew, Bydgoszcz, ul. Nakielska 64 m 38, Pollando.

Daniel ZANKAY, Szavadsagter, 15, Györszentmarton, Hungarujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj, pri spiritismo aŭ pri ĉiu alia temo.

Instruisto 25-jara deziras korespondi tutmonde precipe pri popollerneja instruado, slojdo kaj skoltismo. Curt Bohman, Bergsjö, Svedujo.

Esperanto-Press, Oakville, Ontario, Kanado, serĉas kontakton kun artistaj desegnantoj por ilustru infanajn librojn, lernolibrojn kaj por artiste konsulti nian ofsetan presejon.

Belan, novan broŝuron pri vojaĝoj tra Germanujo (40 paĝoj, esperantlingve) vi ricevos rekompence por esperantajj aŭ

nacia varbmateriale por ekspozicio de Esperanto-Societo Frankfurt/Main, Rohlederstrasse 10.

Esperantista semajno ĉe Mediteraneo-bordo, sub tendo, de la 25-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto. Informos vin LENTAINNE, 3 avenue de la Gaillarde, Montpellier, Francujo.

Por diversspeca periga servo ofertas sin Inĝ. B. Molnár, Amika Servo, Náprstková 9, Praha 1. Je demando aldonu du respondkuponojn.

Kontraŭ unu RK mi sendos bildkarton de Usono per memor-PM. Adrian Hughes, Hillsboro, Oregon, Usono.

Jack Scrivener estis en jaro 1938 universitata studento en Vancouver (Kanado). Li havigis al mi tiam valoran materialon por libro „La Alaska Stafeto”. Mi deziras koni la nunan adreson de mia malnova amiko. Kiu helpos al mi? Koran dankon! F. Omelka, Otrokovice 714, Ĉeĥoslovakio.

Vizitu la ĉiusabatan kunvenon de la Nica Esperanto-Grupo, je horoj 17.30 ĝis 18.30, ĉe Restoracio „La Petite Brasserie”, 27 Bld Raimbaldi, Nice, A.M. Francujo.

Kun profesiaj kaj amatoraj ĵurnalistoj, verkistoj, tradukistoj, pentristoj, fotistoj kaj ordinaraj korespondemuloj mi interŝanĝas: artikolojn, artfotojn, reproduktajojn, albumojn, il. poŝtkartojn, librojn kaj revuojn. Liston kun disponataj materialoj sendas: Metodi Panĉev, Sofio 7, str. Persenk 30, Bulgario.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝtformato
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:
En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj
landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: Administracio:
7. Av. Léon-Gourdaul 5. Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.

MAJSTROVERKO DE LA MONDLITERATURO



Henrik Ibsen:
PEER GYNT

Drama poemo kun komentario
kaj tri norvegaj popolfabeloj.

El la norvega lingvo tradukis
E. A. Haugen

Prezo: bind. 8 gld., broŝ. 6,30 gld.
afranko 0,40 gld.

Eldonis: **ELDONA RONDO**, boks 109,
Trondheim, Norvegujo.

Mendu ĉe **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**
Eendrachtsweg 7 - Rotterdam-C. - Nederlando

En la plej bela regiono de Danlando situas la

Internacia Studenta Centro HALD

kie ĉiusemere kolektiĝas studentoj de la tuta mondo
por ĝui ferian restadon en libera kaj kamaradeca
atmosfera.

Okazos prelegoj kaj kulturaj aranĝoj, diskutoj, ekskur-
soj, amuzaj, sportaranĝoj k.t.p.

Ĉar oni deziras enkonduki la Internacian lingvon,
gestudentoj esperantistaj estas petataj sin turni amase
por peti informojn.

Adreso:

Internacia Studenta Centro, Hald, Viborg, Danlando

GRAVA VERKO MEMORLIBRO DE LA TRIA ESPERANTISTA EŬKARISTIA MONDKUNVENO

Okazinta en la Kadro de la
XXXVI-a INTERNACIA EŬKARISTIA KONGRESO
Kompilita de Pastro D-ro Johano Baptisto Kao O.F.M.

Formato 19x14 cm kun 215 paĝoj de teksto plus 75 ilustraĵoj;
presita sur bonkvalita papero. Bonega libro por ĉiuj biblio-
tekoj de esperantistaj asocioj kaj tre efika instrumento
por la propagando de nia lingvo precipe en la katolikaj
medioj. Prezo: 2 usonaj dolaroj aŭ 8 ned. guldenoj aŭ
150 braz. kruzejoj plus afranko. Akirebla ĉe

LIBRO-SERVO de Espero Katolika
Frederikstraat 10, DORDRECHT,
Nederlando

BRAZILA ESPERANTO-LIGO
Praça da Republica no. 54 sob.
RIO DE JANEIRO, Brazilo

kaj ĉe U.E.A

HOTELO

„De Sparren”

Naarderstraat 70
Tel. 0 2953 - 3422
LAREN (NH)
Nederlando

Belega ĝardeno 11.000 m²

Varma kaj malvarma akvo
en ĉiuj ĉambroj

Esperanto parolata

VAGADO SUB PALMOJ

Jean Ribillard

★

Streĉe
interesaj vojaĝimpresoj

Prezo 2.50 gld. 10 steloj

MENDU ĈE U.E.A.

Oficiala antaŭkongreso en Parizo

29 julio - 2 aŭgusto 1957

Ekskursoj al Versaille, vizito tra
Parizo, Parizo nokte, ŝipekurso
sur Seine

Kotizo 600 Fr.

Paĝoj ĉe la Universala Kongreso en Marseille,
**32, Cours Estienne d'Orves,
Marseille**

2-A INTERNACIA INFANKONGRESETO

dum la 42a Universala Kongreso
de Esperanto

Ludoj, kantoj, dancoj, amuziĝoj,
filmoj, promenadoj, ekskursoj,

internacia kunrestado por geetu-
loj parolantaj Esperanton

Kotizo: 3,000 Fr. inkluzive manĝojn

Skribu al
42-a Universala Kongreso de Esperanto

**32, Cours Estienne d'Orves,
Marseille**

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam